


IL POPOLA CINIO

中國新報

10

1985





En aũtuno

de Sing Janseng

Enhavo

Ekonomia reformo: Reformo de urba ekonomia strukturo en Ĉinio	2
Por celebri la 35-jaran jubileon de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio": Gratuloj de niaj legantoj	19
Esperanto:	
Esperanto — perspektiva lingvo	20
Esperanto kaj junaj kripluloj	22
IUPAK kaj Esperanto	24
[Por komencantoj] Akvoguto kaj ŝtupo; Arbo kaj grundo	25
Esp-novaĵoj	26
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (10): Buntaj literaturo kaj arto	54
Malfermitaj urboj: Ĝanĝjang — havenurbo en suda Ĉinio	6
Vivo de kamparanoj: Nova vivo de la kamparanoj de Ŝjigŭan	13
Vivo de junuloj: Por ardigi ilian malfruan amon	39
Nunaj ĉinoj: Brava elektreveldistino	28
Literaturo: Kvieta rivero (mikronovelo)	45
Por via sano: Centpaŝa ekzercado	47
Vojaĝo tra Ĉinio:	
Ŝanhajo — ĉarma urbo	30
Vojaĝo tra la antikva Nanĝaŭ-regno	42
Arkeologio: Antikva urbo antaŭ 3 600 jaroj	37
Enciklopedieto de Ĉinio: Etiketo de ĉinoj	66
Amikeco: Renkontiĝo por paco kaj amikeco	61
Internaciaj problemoj: Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo	63
Kurantaj aferoj	49
Ĉinlingva kurso	67
Karikaturoj	52
Sur la kovrilo: Sur revenvojo	Foto de Ĝuo Ĝjanŝe
Interne de la kovrilo: En aŭtuno	de Ŝing Janŝeng
Interne de la dorskovrilo: Darakeh-Montaro ĉirkaŭ Norda Tehrano en Frumateno	de F-ino Otad (Irano)
Sur la dorskovrilo: Tajŝan-monto en mateno (ĉinstila pentraĵo)	de Ŭang Lejsja

REFORMO DE URBA EKONOMIA STRUKTURO EN ĈINIO

Ĉi jaro estas la unua jaro, en kiu Ĉinio praktikas ampleksan reformon de la ekonomia strukturo kun tiu de la urbo kiel centro.

En la lastaj jaroj, kun grandega progreso en la reformado de la kampara ekonomia strukturo, Ĉinio faris ankaŭ serion da provoj kaj esploroj en la reformo de urba ekonomia strukturo kaj atingis rimarkindajn sukcesojn, kio kreis al la ekonomia vivo viglan situacion neaperintan dum multaj pasintaj jaroj. Koncize dirite, la faritaj kaj farotaj reformoj estas la jenaj:

Grandigi la aŭtonomecon de entreprenoj en produktado kaj administrado. Pro tio, ke dum multaj jaroj la ekonomia administra povo estis koncentrita al la registaraj instancoj kaj al la en-

treprenoj mankis ekonomia aŭtonomeco, la reformo de urba ekonomia strukturo antaŭ ĉio devas komenciĝi de ŝanĝo de la interrilatoj inter la ŝtato kaj la entreprenoj. En la prova etapo de la reformo la ŝtato faris provadon unue en malgrandaj ŝtataj entreprenoj. En 1978 efektiviĝis la fondusa sistemo de entrepreno, kio donis al entrepreno certan flekseblecon en uzado de kapitalo. En 1979 la Ŝtata Konsilantaro publikigis kvin regularojn, kiaj grandigo de aŭtonomeco de la ŝtataj industriaj entreprenoj en produktado kaj administrado, ĝuo de kvoto de profito de la entrepreno, imposto super fiksa kapitalo k.a. Ĉis 1980 la prova reformo estis farita al pli ol 6 600 entreprenoj de la tuta lando. Surbaze de resumo de sperto en la provado de grandigo de aŭtonomeco



Estro de fabriko en Uhan inter teknikistoj

Teknikistoj de la Uhan-a Elektronika Teknika Konsulta Kompanio reguligas mikro-komputerojn, kiuj estas muntitaj per pecoj importitaj de aliaj landoj.




en la pasintaj jaroj, la Ŝtata Konsilantaro publikigis en 1984 "Provizorajn Difinojn pri Pluapaŝa Grandigo de la Aŭtonomeco de la Ŝtataj Industriaj Entreprenejoj", kio plue grandigis la aŭtonomecon de la entreprenoj en produkta kaj administra planado, vendado de produktaĵoj, difinado de prezoj, elektado kaj aĉetado de materialoj, uzado de fonduso, traktado de kapitalo, organiza strukturo, laboro kaj laborforta aranĝo, salajro kaj premia mono kaj kuna administrado. Ĉijare la ŝtato, daŭre vigligante malgrandajn entreprenojn, metas sian atenton ĉefe sur la vigligon de grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. Pro tio oni devas plene efektiviĝi ĉiujn difinojn deciditajn de la ŝtato pri grandigo de la aŭtonomeco de la entreprenoj, iom post iom redukti ordonajn planojn por la grandaj entreprenoj, kiuj faras bonan administradon sed restigas por si tro malmulte da kvoto de profito, kaj malaltigi kaj reguligi impostan procenton. Interne de la entreprenoj oni devas starigi diversformajn ekonomiajn respondecajn sistemojn, konvene malgrandigi la administrajn skalojn, multigi formojn de administrado kaj diversformajn ekonomiajn unuigojn kaj kunlaborojn por plene disvolvi grandan latentan forton de la nunaj entreprenoj.

Starigi diversformajn ekonomiajn respondecajn sistemojn. Oni ekprovis diversformajn ekonomiajn respondecajn sistemojn en parto da regionoj kaj entreprenoj en 1980 kaj faris la samon en ĉiuj entreprenoj sub la tutpopola posedsistemo en 1981. Tia respondeca sistemo postulas, ke la gvidaj instancoj de la entreprenoj, entreprenoj, laborejoj, grupoj, oficistoj kaj laboristoj ĉiuj bone sciu sian respondecon al la ŝtato, kaj ke oni donu konvenajn rajtojn al la entreprenoj, administran-

tojn, oficistoj kaj laboristoj, ĝuste traktu la rilatojn inter la ŝtato, entreprenoj, oficistoj kaj laboristoj kaj kombinu la ekonomian respondecon kaj la ekonomiajn interesojn de la entreprenoj kaj oficistoj kaj laboristoj. En 1984 oni provis ankaŭ fabrikestre respondecan sistemon en 2 913 entreprenoj de la tuta lando. Ĝia ĉefa enhavo estas praktiki sistemon enoficigi gvidantojn per balotado, praktiki sistemon de perioda enoficigo kaj tiun de stariĝo de gvidantaro per estra nomumo; simpligi administrajn instituciojn interne de la entreprenoj; reformi la sistemon de la laboradministrado kaj tiun de salajro kaj premio kaj disvolvi modernan administran sistemon. Praktiko pruvis, ke tiuj entreprenoj, kiuj praktikas ekonomian laŭkontraktan respondecan sistemon kaj fabrikestre respondecan sistemon, rikoltis altan ekonomian efikon.

Adekvate reformi la sistemon de financo, imposto, var-prezo kaj banko. Rilate al la financa sistemo oni prenis ĉefe rimedon "klasifiki impostospecojn, taksu kaj decidi enspezon kaj elspezon kaj fari laŭnivelan kontrakton" kaj faris unuapaŝajn reformojn en iuj konkretaj sistemoj. Rilate al impostokolekta sistemo oni efektiviĝas ĉefe anstataŭigon de profito-liverado per impostado kaj rilate al varpreza sistemo kulan prezdifinadon de la ŝtato kaj la entreprenoj kaj ankaŭ liberan prezdifinadon, reguligas prezojn de agrikulturaj, kromokupaj kaj partaj industriaj produktaĵoj, donas liberecon difini prezojn de malgrandaj varoj kaj permesas praktiki ŝanĝeblajn prezojn por parto da produktaĵoj. Samtempe kun libera difinado de prezoj, Ĉinio reformos ankaŭ salajran sistemon. La nuna salajra sistemo praktikata en Ĉinio estis difinita



Uej Fuhaj (la dekstra), urbestro de Daljan, interparolas kun komercisto de Singapuro pri investado al Daljan-haveno.

en la 50aj jaroj kaj restas ĝis nun senŝanĝa, kio kaŭzis la fakton, ke la rango kaj enspezo de la laboristoj kaj oficistoj ne respondas al ilia ofico, respondeco, kapablo kaj kontribuo, kio grave malhelpis al la laboristoj kaj oficistoj disvolvi sian aktivecon. En tiu ĉi salajra reformo la totala kvanto de salajro de ŝtata entreprenado ŝanĝiĝos laŭ ĝia ekonomia efiko, ke la salajro kaj premia mono de la laboristoj kaj oficistoj ŝanĝiĝu kune kun la ekonomia efiko de la entreprenado kaj ilia kontribuo. En la ŝtataj organoj kaj neproduktaj institucioj oni praktikas salajran sistemon kun oficalajro kiel la ĉefa por kompakte kunligi salajron kun la ofico, respondeco kaj kontribuo de la laboristoj kaj oficistoj. Rilate al banka sistemo, investado por fundamenta konstruado venas ĉefe el banka monprunto anstataŭ el financa asigno, la cirkula kapitalo de entreprenado estas administrata sole de banko kaj stariĝis diversaj fakaj bankoj.

Aktive disvolvi diversformajn ekonomiojn kaj diversajn administrajn manierojn. Dum solidigo kaj disvolvo de la ekonomio de la tutpopola posedsistemo, oni plenergie disvolvas kolektivajn kaj individuan ekonomion, diversajn kunlaborojn kaj ekonomiajn kombinaĵojn de la tutpopola, kolektiva kaj individua ekonomioj, kio prosperigis la tutan ekonomian vivon. En parto de la tutpopolaj malgrandaj entreprenoj, precipe tiuj de podetala vendado, manĝaĵservo, metiarto ktp., oni provpraktikas laŭkontraktan administradon de kolektivo aŭ individuo, pruntan kaj kreditan administradon aŭ faras tion samkiel la kolektiva entreprenado. Dank' al la moderigo de posedsiste-

moj, la jara produktovaloro de la tutlandaj kolektivaj industriaj entreprenoj en 1984 pliiĝis je 28.5% ol tiu en 1983, tiu de alitipaj ekonomiaj entreprenoj je 69.1%, kaj ĉiuj superis tiun de la industriaj entreprenoj sub la tutpopola posedsistemo, kiu pliiĝis je 10.8%.

Malfermi la pordon al la eksterlando. Ĉinio prenas pordomalfermon al la eksterlando kiel sian longtempan bazan politikon. Ĝi jam praktikas specialajn politikojn kaj alprenas flekseblajn rimedojn en la provincoj Ĝuangdong kaj Fuĝjan, starigis specialajn ekonomiajn zonojn de Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen kaj malfermis 14 apudmarajn havenurbojn kaj Hajnan-insulon. Ĉi-jare la ŝtato malfermis la deltojn de Jangzi-rivero kaj la Perla Rivero kaj la triangulan regionon de Ŝjamen, Ĉjŭanĝoŭ kaj Ĝangĝoŭ en la suda Fuĝjan, disvastigas la eksteran teknikan interŝanĝon kaj kunlaboran skalon, aktive utiligas eksterlandan kapitalon por allogi fremdlandajn komercistojn funkciigi en Ĉinio entreprenojn investitajn per kuna aŭ solflanka kapitalo kaj kune administratajn. En 1984 la novaj interkonsentoj subskribitaj de la 14 urboj pri rekta uzo de eksterlanda kapitalo superis 400 kaj la interkonsentoj pri uzo de eksterlanda monprunto por teknika reformo atingis proksimume 1 000. En tiu ĉi jaro la utiligita eksterlanda kapitalo en la supraj du flankoj 1.5-oble kaj 2.5-oble respektive pliiĝis ol la totala sumo de la pasintaj kvin jaroj.

Reformi cirkulan sistemon. Disvolvi diversformajn ekonomiojn, preni diversajn aĉetajn kaj



Antaŭeniranto en la reformo de ekonomia strukturo Ma Sengli (la tria de maldekstre) ekzamenas novan produktaĵon.



Direktoro Li Ŝusen (dekstre) purigas aŭton kune kun laboristo.

vendajn formojn kaj malfermi pli da cirkulaj kanaloj, kaj samtempe redukti planizitajn specojn de industriaj produktaĵoj, nuligi kuponojn por dekoj da varoj, restarigi la karakteron de kunlabora ekonomio de la proviza-venda kooperativo kaj starigi en la urbo agrikulturaĵajn foirojn kaj apartajn komercajn centrojn de indusrtiaj produktaĵoj (inkluzive de merkato por produktaj rimedoj). Ĝis la fino de 1984 en la tuta lando stariĝis jam pli ol 1 400 komercaj centroj, inter kiuj estis 1 098 centroj por industriaj produktaĵoj kaj 338 por agrikulturaj kaj kromokupaj produktaĵoj.

Fari sintezan reforman provadon al urba ekonomia strukturo. En la pasinteco Ĉinio ne turnis grandan atenton al la pozicio kaj rolo de la urboj en la ekonomia vivo, tiel ke la urboj ne povis bone ludi sian rolon, kaj aperis financa malfacilo de la nivelo de urbo. La urba kaj fundamenta konstruado estis postiĝinta kaj la ekonomia disvolviĝo limigita. Samtempe kun la disvolviĝo de la vara ekonomio, fariĝas pli kaj pli urĝe, ke la urbo devas esti centro de financo, informo, vara cirkulado, trafiko, scienco kaj eduko. Por tio, en 1981 Ĉinio komencis fari sintezan reforman provadon de ekonomia strukturo en iuj mezgrandaj urboj, kiaj Ŝaŝi kaj Ĉangĝoŭ, kaj tiun en Ĉongĉing en 1983. Ekde 1984 tiu ĉi laboro progresas rapide, la provaj urboj atingis 54, el kiuj la urboj Ĉongĉing, Kantono, Uhan, Ŝenjang, Ŝjian, Daljan, Harbin, post la sankcio de la Ŝtata Konsilantaro, ĝuas ekonomian administran aŭtoritaton de provinca nivelo. Tiu ĉi reformo ludas gravan

rolon por ŝanĝi la antaŭan apartigon inter regiono kaj departemento, formi diversajn ekonomiajn centrojn kaj ekonomiajn retojn malfermajn kaj subtenatajn de urbejo, kaj donas sperton al ĉiufanka reformo.

En la lastaj jaroj la urba sinteza ekonomia efiko evidente altiĝis, dank' al la diritaj reformoj. Ni prenu Ĉongĉing kiel ekzemplon. (Bv. legi la artikolon "Ĉongĉing Provanta Urba Ekonomian Reformon" en n-ro 1 de EPC en la kuranta jaro.) En la pasinteco la jara enspezo de la urbo hezitis ĉ. miliardo da jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas al unu usona dolaro) kaj en 1984 ĝi atingis pli malpli 1.4 miliardojn da jŭanoj.

Ĝeneraldire, la reformo de la urba ekonomia strukturo en Ĉinio iras glate kaj akiris grandan sukceson, tamen ankaŭ aperis iuj problemoj. Ekz., ekonomio disvolviĝis tro rapide, la kredita kaj konsuma fonduso kreskis tro alten, la konstrua skalo estis iom pli granda, mono emisiĝis tro multe, varprezoj leviĝis tro rapide. La kaŭzo kuŝas en tio, ke makroreguligo kaj limigo estas fariĝintaj ne en ĝusta tempo sub la nova cirkonstancaro de disvolvo de la laŭplana vara ekonomio. Ĉi-jare la ŝtato devas fortigi kunordigon kaj kompletigon de diversaj reformaj rimedoj, sinteze uzi ekonomiajn, jurajn kaj administrajn rimedojn, fortigi makroreguligon kaj administradon, kombini daŭre vigligon de ekonomio kun fortigo de makroadministrado por aktive, diskrete kaj plenkamplekse antaŭenpuŝi la reformon de la ekonomia strukturo.

ĜANGĜANG—HAVENURBO EN SUDA ĈINIO

de LI ĈJANG

Lejĝoŭ-duoninsulo situas ĉe la suda ekstremo de la ĉina ĉeftero. En la antikva Ĉinio ĝi estis ekzilejo pro sia malproksimeco. Ĝi restis ankoraŭ malriĉa kaj postĝinta eĉ en la 40-aj jaroj de la nuna jarcento. Sed ĝi estas abunda je naturaj riĉaĵoj ĉu enmare, ĉu surtere kaj subtere.

La urbo Ĝangĝang nun administras 4 distriktojn kaj 5 guberniojn, kun totala areo de 12 400 kvadrataj kilometroj. En ĝia norda parto kuŝas malaltaj montetoj kaj en la ceteraj partoj etendiĝas vastaj ebenaĵoj. La urbo rigardas al la Suda Ĉina Maro kaj havas marlinion de pli ol 1 300 kilometroj. Tie regas mara klimato de subtropika zono, pluvo estas riĉa, vintro ne malvarma kaj somero ne varmega, kio estas taŭga por kreskado de la plantoj tropikaj kaj subtropikaj. En la urbo verdas la naturo kaj belas floroj tutjare. Oni nomas ĝin ĝardena marborda urbo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, por elimini la postĝintecon kaj malriĉecon de sia hejmloko, tieaj loĝantoj konstruis grandan akvorezervejon, fosis kanalon trapasantan la duoninsulon, sternis laŭ la marbordo ventimunan kaj sablosubjugan arbaran zonon kaj entreprenis dekojn da grandaj kultivejoj kaj forstokulturejoj por subtropikaj plantaĵoj. La peniga pionira laboro prosperigis agrikulturon, forstumon, brutobredadon, kromproduktadon kaj fiŝadon kaj akcelis plenamplksan disvolviĝon de industrio, minejo, trafiko, kulturo, eduko, medicino kaj higiena laboro. Nun en la urbo vivas 4 630 000 loĝantoj. Kaj la urbaj distriktoj okupas areon de 25 kvadrataj kilometroj kun 300 000 loĝantoj. La duoninsulo havas siajn produktajn bazojn de sukero, arakidoj, kaŭĉuko, fruktoj, salo, nafto kaj oceana fiŝado. Ĝi estas ekonomia centro de okcidenta Ĝuangdong-provinco.

La geografia situo de la urbo estas grava. Ĝi rigardas al Hajnan-insulo trans la maro kaj estas nepre irata vojo inter la insulo kaj la ĉeftero. La haveno Ĝangĝang estas la plej oportuna loko por ekveturo de ĉinaj oceanaj ŝipoj al la okcidento kaj la sudo, kaj ankaŭ unu el la 8 plej grandaj havenoj de Ĉinio. La haveno estas la plej profunda el la havenoj en suda Ĉinio kaj ŝirmita de insuletoj ekstere. Kaj interne de ĝi la vento estas malforta kaj la ondoj mildaj. Dekmilonelaj ŝipoj povas en- kaj elhaveniĝi tage kaj nokte. La haveno havas tri ŝarĝejojn kaj 15 ankrejojn, el kiuj 9 estas por dekmilonelaj ŝipoj. Ĝia jara transporta kvanto atingas 12 milionojn da tunoj. Nun ŝipoj de la haveno navigas al pli ol 70 landoj kaj regionoj kaj la haveno havos des pli grandan disvolviĝon. Ankaŭ trafikado rivera, fervoja kaj ŝosea estas facila. La civilaj aviadiloj flugas de tie al Kantono kaj Haj-





Elektraj marmitoj produktitaj de Ĝangĵang


koŭ. Aerodromo por grandaj pasaĝer-aviadiloj estas en konstruado. Nun la urbo jam fariĝis la centro de mara, tera kaj aera trafiko en okcidenta Ĝuangdong-provinco.

Hodiaŭ la nafto en la Suda Ĉina Maro altiras atenton de la mondo. Koncernaj materialoj montris, ke la kontinentbreto de la Suda Ĉina Maro estas unu el la kvar koncentroj de oleo kaj gaso en la mondaj maroj. La urbo Ĝangĵang estas sidejo de la Petrola Kompanio de la Okcidenta Parto de la Suda Ĉina Maro. Ĉe la orienta marbordo de la golfo leviĝas petrola urbo. Nun la okanonc-eniraj klikoj organizitaj el ĉ. 20 kompanioj de 8 landoj starigis tie sian agentejon. Kunlaborante kun la petrola kompanio, ili faris olean prospektoradon en 9 regionoj laŭ kontrakto kaj trovis pli ol 400 strukturojn por oleaj formiĝo kaj rezervo. Kun plua disvolviĝo de la mara ole-produktado la urbo fariĝos la plej granda energia kaj trafika centro ĉe la suda ĉina marbordo.

En la urbo funkcias pli ol 300 fabrikoj kun bonaj kondiĉoj, sed

Ĉinaj kaj eksterlandaj teknikistoj laboras sur putobora platformo.





Naturgasa puto borita de Ĉinio kaj Usono en la Suda Ĉina Maro

multaj produktaĵoj estis malnovaj kaj malmulte profitaj pro malalta produktovaloro. Por rapide elimini la postĝintecan de la loko, antaŭ ĉio oni enkondukis avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn kaj faris teknikan reformon al la malnovaj entreprenoj ekde praktikado de la politiko malfermi la pordon al la eksterlando. Nun ili reformas kaj disvolvas ĉefe elektronikan teknikon kaj industriojn de manĝaĵoj, hejmaj elektraj aparatoj, konstruaj materialoj kaj kemi-fibraj tekstilaĵoj, inter kiuj tiu de hejmaj elektraj aparatoj plej rapide ricevas bonan efikon. Iu malgranda metalajfabriko entreprenata de urba kvartalo en kelkaj jaroj disvolviĝis en kompanion de hejmaj elektraj aparatoj kun 11 fabrikoj kaj proksimume 6 000 laboristoj. Ĝia jara produktovaloro superis 100 milionojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj

egalas unu usonan dolaron). La aŭtomata elektra marmito varmizola kun la marko Triangulo produktita de la Tria kaj Sesa Fabrikoj de Hejmaj Elektraj Aparatoj gajnis la premion "Ora Drako" donitan en 1984 de la Ŝtata Ekonomia Komisiono kaj estas ekspoziciata en la Internacia Foiro de Kanado. La marmitoj nun vendiĝas en Hongkong, Aŭmen, Francio, Tajlando, Malajzio, Singapuro, Aŭstrio kaj aliaj pli ol dek landoj kaj regionoj. La kompanio planas enkonduki fremdlandajn avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn por reformi kaj konstrui fabrikojn de elektraj marmitoj, kaseroloj, akvovarmigiloj, kruĉoj kaj fridujoj. En la nemalproksima estonteco la kompanio fariĝos centro de hejmaj elektraj aparatoj kun elektraj varmigiloj kiel la ĉefaj produktaĵoj.

Samtempe kun tio, la urba magistrato decidis starigi ekonomian kaj teknikan ekspluatatan regionon kun totala areo de 9.2 kvadrataj kilometroj. Laŭ la zorgema projekto de fakuloj, tie oni disvolvos ĉefe industriojn manĝaĵ-prilaboran, tekstilan kaj malpezan kaj tiun de bioproduktaĵoj kaj disvolvos ankaŭ komercon, turismon, sciencan, edukan kaj kulturen aferojn. Nun Jenmin-strato, 60 metrojn larĝa kaj 7 360 metrojn longa, estas transdonita al trafiko. Laŭ la projekto oni unue disvolvos elektronikan industrion en areo de 2 kvadrataj kilometroj ambaŭflanke de la strato, tie aperos domegoj komercaj, financaj kaj aliaj. Ĝi fariĝos la plej vigla kaj plej prospera loko kaj administra centro de la urbo.

La ekspluata regiono privilegias en-kaj eksterlandajn komercistojn. Mil komercistoj el Usono, Britio, Francio, FR Germanio, Svisio, Svedio, Japanio, Belgio, Aŭstralio, Singapuro kaj aliaj landoj faris enketon tie kaj subskribis ĉ. 100 kontraktojn kaj interkonsentojn pri multaj kampoj.

La belaj pejzaĝoj de suda Ĉinio, favoraj medioj de la golfo, ĝarden-similaj stratoj kaj kortoj, diversstilaj parkoj faris la urbon alloga turisma loko. En la vasta Ĝanĝang-golfo dissemiĝas multaj insuletoj, ĉirkaŭ kiuj kreskas densaj kontraŭventaj forstozonoj. Tie la blua maro, tajda muĝado kaj venta kareso forte allogas turistojn. Nun koncernaj departementoj estas pretaj enkonduki eksterlandajn kapitalojn kaj ekipaĵojn kaj starigi marbordan amuzejon kun mara aktivado kiel la ĉefa enhavo. La senlima maro, verda arbaro kaj pura plaĝo kun granda ĝojo bonvenigas turistojn el ĉiuj anguloj de la mondo.




La olehaveno de Ĝanĝjang en nokto



La haveno Ĝanĝjang



Japanaj komercistoj rigardas la modelon de la disvolvata regiono en Ĝanĝjang.



Novaj domoj

Vidaĵoj en Ŝjigŭan-vilaĝo

Fotoj de CAJ HAJFENG



Balo de junuloj

Gastoĉambro en kamparana domo





Fiŝbaseno, kiu servas ankaŭ kiel ripozejo

Maljunuloj en ŝakludo





Gajaj infanoj

Balkono de kamparana domo



Vilaĝanoj laboras en sia vestofarejo.



NOVA VIVO DE LA KAMPARANOJ DE ŜJIGŬAN

Por koni novajn morojn de la ĉinaj kamparanoj, iu kanada vojaĝ-grupo speciale veturis al Ŝjigŭan-vilaĝo kaj loĝis tie du tagojn. Ĝia pli-ol-40-jara membro Staikler kun alta klereco ĝoje diris: "Antaŭ mia veturo al Ĉinio mi iom sciis pri la vivo de la ĉinaj kamparanoj el libroj, ĵurnaloj kaj televido, tamen mi ne atendis, ke la viv-nivelo de ŝjigŭan-anoj estas tiel alta. Tie povas loĝi eĉ prezidantoj."

La vilaĝo miriga por la kanadaj turistoj, nun nomata Ĝenerala Kompanio Mingĝu de Ŝjigŭan, situas en Muping-gubernio en la norda parto de Ŝandong-duoninsulo. Aprile ĉi-jare mi vizitis ĝin.

MASTRO DE "GENERAL-DOMO"

En la tago, kiam mi atingis la vilaĝon, mi iris viziti lokanon, Li Dehaj, ĝeneralan direktoron de la kompanio. Sed li ne estis hejme. Lia edzino Kong Ŝjanjing diris al mi kun rideto: "Neniu scias, kiam li revenos kaj kiam li eliris. Ĉiufoje li eliris sen mia scio. . ."

La mastrino afable invitis min pririgardi ilian loĝejon.


Tio estas loĝejo de la 4-a generacio kaj nomata ankaŭ "general-domo" pro sia alta kvalito kaj simileco al du-etaĝa somerdomo de generalo. Ĝi estas bele pro-

jektita, racie strukturita kaj riĉa je sunlumo. La verdeta muro kaj ruĝa tegmento plibeligis ĝin. La balkono estas ornamita per gravuraĵoj en la supra parto. Antaŭ kaj malantaŭ la domo kuŝas po unu malgranda korto. En la antaŭa korto estas sunenergia banejo kaj tenejo. En la malantaŭa korto estas diversaj objektoj. La mastrino diris al mi, ke la domo estis projektita de Li Dehaj mem. La loĝejo kun ses ĉambroj supraj kaj malsupraj kovras areon de 210 kvadrataj metroj. En la ĉambroj estas pend-lampoj, sofoj, ŝrankoj, ronda tablo, kolora televidilo, lavmaŝino, kudromaŝino,

diktafono, telefono, gas-forno kaj elektra varmigilo. Min plej mirigis eleganta kaj antikveca palisandra meblaro arĝente inkrustita — tualet-tablo, vitra ŝranko, libroŝranko, brakseĝoj kaj tablo por kaligrafado kaj pentrado. Sur muro pendas kaligrafiaĵoj de fama kaligrafo kaj bildoj el konkoskulptaĵoj.

Post kelkaj minutoj personaŭto kun marko "Ŝanhajo" haltis antaŭ la domo. Elaŭtiĝis ĝuste Li Dehaj. Li estas pli-ol-40-jara, mezkreska, forta. Lia ronda vizaĝo montras lian maturecon kaj spritecon.

La kultura palaco, kiu ampleksas 2 800 kvadratajn metrojn





Traktor-muntejo de la vilaĝo

“Pardonon, ke mi longe tenis vin atendanta.”

“Ĉu la 450 familioj en via vilaĝo vivas same kiel la via?” mi demandis lin, endomiĝinte.

“Preskaŭ same,” respondis li. “Ĝuste kiel vi vidis, nia vilaĝo nun konstruas domojn de la kvara generacio. La unua-generaciaj domoj estis pajl-tegmentaj kaj termuraj, starigitaj post 1949. Tiaj domoj malaperis antaŭ longe. En 1978 ni konstruis vicojn da unu-etaĝaj tegolitaĵaj brikaj domoj, t.e. la dua-generaciaj domoj. Ĉiu familio havis tri ĉambrojn kun meznombra areo de 40 kvadrataj metroj kaj plie unu malgrandan korton. En 1981 ni decidis konstrui tria-generaciajn domojn, similajn al la urba apartamento. Ĉiu loĝejo kovras 80 kvadratajn metrojn. Tamen ne longe post sia enloĝiĝo oni trovis ĝin ne bone ekipita, ekz. mankas banĉambro kaj klozeto. Tial en 1984 ni komencis konstrui kvara-generaciajn domojn, vendatajn po 25 000-30 000 jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas unu usonan dolaron). La dom-aĉetantoj povas kvitiĝi en 5 jaroj. Krome en nia vilaĝo populariĝis koloraj televidiloj kaj gas-fornoj. La vilaĝo subvencias ĉiun aĉetanton de kolora televidilo per 300 jŭanoj,

ĉiun aĉetanton de fridujo kaj lavmaŝino per 1/4 de la pago kaj ĉiun aĉetanton de nov-tipa meblo per 1/10 de la pago. Nun en nia vilaĝo 1/3 de la familioj havas fridujon kaj 2/3 lavmaŝinon, elektran ventumilon, diktafonon kaj altklasajn palisandrajn meblojn kaj 160 familioj havas telefonon. 80 nederlandaj fridujoj antaŭpagitaj ankoraŭ ne atingis la aĉetantojn. Nun en la vilaĝo oni konsumas farunon kaj rizon, loĝas en etaĝdomo kaj uzas koloran televidilon kaj biciklon kun marko ‘Fenikso’. Mi, iom obstina, ne ŝatas motorciklon, ĉar ĝi povus facile kaŭzi akcidenton. . .”

RIĈIĜO

Li Dehaj estas babilema kaj multscia. Parolante pri la pasinteco de la vilaĝo, li diris, ke kiam li estis knabo, la vilaĝo estis ekzekutejo. En tiuj jaroj la tieaj loĝantoj vivis kiel en infero. Ĝia vilaĝanoj el diversaj lokoj portas 40 malsamajn familiajn nomojn. Inter ili troviĝis jardungitoj, taglaboristoj, rikiŝistoj, opifumejaj mastroj, trumpetistoj, almozuloj, sangvendistoj kaj aliaj. La vilaĝo estis miniaturo de la malnova Ĉinio. Post la Liberiĝo de la lando ŝanĝiĝis la socia pozicio de la malriĉuloj kaj



Personaŭto por kamparanoj de la vilaĝo

leviĝis ilia vivnivelo. Tamen antaŭ 1978 en la vilaĝo oni sin okupis ĉefe pri gren-produktado. Kvankam la kamparanoj havis altan produktokvanton, la sola gren-produktado ne povis multe levi ilian enspezon. En 1979 la vilaĝo komencis grandskalan reformadon. La kamparanoj starigis ligno-prilaborejon, vestofarejon, riparejon, ludil-farejon, fabrikon de elektronikaj instrumentoj, bredejon de laktobovinoj, restoracion, ĉiovendejon kaj hortikulturistan grupon. Nun ili ĉiuj fariĝis salajruloj. En 1981-1984 ĉiu laborulo kreis mezajn produktovaloron de 7 jŭanoj en unu tago kaj la jara pokapa enspezo estis 1 000 jŭanoj. Laŭ la plano ĉi-jare la jara pokapa enspezo atingos 5 000 jŭanojn.

“Ĉu ne estas diferenco de salajroj?” mi demandis.

“Kial ne?” li diris. “El la 1 600 laboruloj de la vilaĝo lernoknaboj ricevas nur 30 jŭanojn ĉiumonate kaj malmultaj aliaj eĉ 300 jŭanojn. La unuaj eble ne estas malkontentaj, ĉar homoj povantaj fari ilian laboron troveblas ĉie, dum la lastaj eble ne estas kontentaj, ĉar ili estas lertaj en laboro, administrado aŭ havas kompare altan teknikon kaj povas krei multe da riĉaĵoj.”




Matena gimnastiko, ĉiutaga ekzerco de junuloj

Kampana familio en manĝado

“Ĉu tio povas kaŭzi polari-
zon?”

“Ne, ĉar ĉiu familio havas ler-
noknabon kaj ankaŭ lertan labo-
riston kaj sekve la meza monata
salajro de ĉiu laborulo superas
100-200 jŭanojn. En nia vilaĝo
troviĝas neniu familio, kies mem-
broj enspezas po 30 jŭanojn, nek
familio, kies membroj enspezas
po 300 jŭanojn.”

Vidante, ke Li Dehaj estas
homo facile alirebla, mi do de-
mandis lin malkaŝe: “Vi funk-
ciigas tiel multe da entreprenoj,
ĉu ili ne profitas de ŝtata man-
ko?”




Kampanino telefonas en sia gasteĉambro.

“Prave,” li diris. “La vilaĝaj
entreprenoj estas destinitaj por
ŝtopi breĉojn de la ŝtataj entre-
prenoj. Niaj entreprenoj estas
malgrandaj kaj povas facile ŝanĝi
sian produktadon kaj reguligi
siajn produktaĵojn laŭ la bezono
de la merkato.”

“Ankaŭ la ŝtataj entreprenoj
sin reformas kaj perfektigas. Se
venos tago, kiam viaj produkta-
ĵoj perdos sian avantaĝon, kion
do vi faros?”

“Kiel ajn perfektaj ili estos, ni
trovos breĉojn ĉe ili. Cetere ni
havas fabrikon de elektronikaj
instrumentoj, kiu servas kiel re-
zervo. Estontece en la mondo

de ŬANG JUFENG





Li Dehaj en laboro

*En la besto-ĝardeno
de la vilaĝo
de ŬANG JUFENG*



certe regos elektronoj. Kiam niaj aliaj fabrikoj perdos la avantaĝon en la konkurenco, leviĝos nia fabriko de elektronikaj instrumentoj, kiu sola povos vivteni nian tutan vilaĝon. Eĉ se ĉiuj niaj entreprenoj perdos la konkurencon, ni kamparanoj kulturos le-

gomojn en forcejoj por liveri ilin al la merkatoj, restoracioj kaj hoteloj. Eĉ tiam ni povos vivi same riĉe kiel hodiaŭ."

Mi miris. "Ĉu mi parolis kun kamparano?" mi demandis min. La vilaĝo Ŝjigŭan havas tiel bonan ekonomon kaj ne estas

mirige, ke ili tiel rapide suriris la vojon de riĉiĝo.

ADIAŬO AL LA MALNOVA KULTURO


Dum mia vizito mi atentis ne nur la riĉecon de la kamparanoj, sed ankaŭ ilian nunan vivmanie-

ron kaj spiritan fizionomion.

Kampano, tiu vorto havas striktan sencon: terkulturisto longe loĝanta en la kamparo. Tio estas tradicio ekde la antikveco. La viroj ne povas sin liberigi de plugiloj, ŝpatoj kaj ŝoveliloj, dum la virinoj ĉiam implikiĝas en la manĝaĵ-preparado.

Sed ĉio ŝanĝiĝis subite. La vilaĝanoj de Ŝjiguan enloĝiĝis en domoj kun ĝardeneto. La manoj kutimaj al manipulado de ŝpatoj kaj ŝoveliloj nun sin turnas al telefono kaj diktafono. La piedoj kutimaj al la kota tero nun paŝas sur altklasa, belkolora tapiŝo. La eksmodaj roboj malaperis antaŭ longe. Nun furoras kostumoj en ĉina kaj okcidenta stiloj kaj vestoj laŭmodaj. La vilaĝanoj portas sur sia brusto insignon verdan kun propra foto kaj surskribo "Ĝenerala Kompanio Mingĝu de Ŝjiguan". Ŝanĝiĝis ankaŭ iliaj salutvortoj. Ĉe renkontiĝo ili demandas unu alian: "Ĉu vi havas noktan deĵoron?" aŭ "Ĉu vi finis vian deĵoron?" anstataŭ "Ĉu vi iras labori en la monto?" kaj "Ĉu vi iras labori en la kampo?" La mallongaj salutvortoj esprimas ilian ĝojon kaj fieron.

Matene la loĝantoj kun termoso iras al bov-bredejo por preni lakton. Ili povas manĝi en la manĝejo de la vilaĝo. Por ĝui bongustajn pladojn aŭ regali gastojn, ili povas iri al la restoracio, kie laboras eminentaj kuiristoj. Se ili ne volas eldomiĝi, ili povas telefoni al la restoracio, kiu poste portos al ilia hejmo frikasitajn salikokojn, brilajn markolbasojn, sekajn pektenojn kun ovoblanko kaj bongustajn kokaĵon, fiŝojn, porkaĵon kaj ovaĵon. La vilaĝanoj nun turnas sian atenton al la nutraj manĝaĵoj, ekz. aminaj acidoj, vitaminoj kaj proteinoj.



En naĝejo de la vilaĝo


de ŬANG JUFENG

Antaŭe pro la malalta vivnivelo kaj feŭdisma ideologio la bofilinoj ĝenerale ne povis manĝi la samajn manĝaĵojn, kiujn prenis iliaj bogepatroj kaj edzo, kio nun komplete malaperis.

En la lastaj jaroj la vilaĝo per 2 milionoj da jŭanoj konstruis kulturen palacon, enhavantan infanvartejon, infanĝardenon, lernejon, bibliotekon, eksponejon, kinoteatron, projekciejon de bildbendoj, amuzejon, ekzercejon de luktarto, prelegejon, hejmon de gejunuloj, geknaban ludejon kaj ludĉambrojn de tablotenis kaj diversaj ŝakoj. La vilaĝanoj konstruis ankaŭ kvietan parkon kun artefarita monto, pavilono, florbudoj kaj fontano. Tie estas

eksponataj ankaŭ bestoj kaj birdoj.

Mi venis al la infanĝardeno kaj vidis, ke 3-4-jaraj geknaboj kun larĝe malfermitaj okuloj kaj buŝo atente aŭskultas rakonton. Juna kaj bela instruistino Sun Jingju instruis al 6-7-jaraj geknaboj ludi harmonikon. Ŝi diris al mi post la leciono, ke en la infanĝardeno la geknaboj devas lerni ne nur simplan kalkulon, sed ankaŭ la han-lingvan fonetikan alfabeton kaj iujn ideografiaĵojn, popularajn sciojn, kantojn, dancojn, pentradon, sporton kaj ludon. En la infanĝardeno estas lignaj ĉevaletoj, plastaj elefantoj kaj ludiloj, pafiloj, vagonaroj kaj aviadiloj, balancboatoj, baskuloj, rotacia ronda tabulo kun seĝoj



Vestolavejo por vilaĝanoj

kaj spaco-veturilo kosta je 40 mil jŭanoj.

Estas granda la sportejo el 4 korbopilka ludkampoj, inter kiuj 2 estas ekipitaj per pendantaj elektraj lampoj, kaj unu flugpilka ludkampo. Antaŭ nelonge oni per cent miloj da jŭanoj konstruis 3 senkovrajn naĝejojn ĉiu kun longeco de 50 metroj, kaj nun estas preta konstrui naĝejon en domo.


Por ke la kamparanoj fariĝu pli inteligentaj, la vilaĝo starigis, krom element- kaj mezlernejoj, ankaŭ mezgradan fakan lernejon per 550 000 jŭanoj.

La faka lernejo nun majeste staras ĉe la nove fosita lago Ninghaj. Li Dehaj laboras kumule kiel ĝia rektoro. En la lernejo instruas 13 diplomitoj de superaj lernejoj. Plejparto de la lernantoj estas abiturientoj kaj kampa-

raj gejunuloj kun sama klereco kiel la abiturientoj, akceptitaj post la ĝenerala ekzameno en la provinco. Post 2-jara lernado la lernejo donos diplomon al tiuj, kiuj sukcese trapasos la ekzamenon. Kiu volos labori en la vilaĝo Ŝjigŭan, povos labori tie kiel oficiala laboranto post duonjara provado, kaj ricevi tiom da salajro kiom teknikisto. La vilaĝo respondecas pri ilia lernokosto kaj ĉiumonate subvencias ilin per 30 jŭanoj.

La ŝanĝiĝo de la kamparana vivo de Ŝjigŭan spegulas la atingojn de la reformado de la ekonomia sistemo praktikata en la ĉina kamparo. Kvankam en multaj lokoj de Ĉinio la loĝantoj ne estas tiel riĉaj kiel la vilaĝanoj de Ŝjigŭan kaj en iuj lokoj oni nur ĵus solvis la problemon de manĝo kaj vestoj, tamen kiu aŭdacos diri, ke la hodiaŭa Ŝjigŭan ne estas la morgaŭo de multaj aliaj ĉinaj vilaĝoj?

Lokoj Menciitaj en Ĉi Tiu Numero



1. Pekino
2. Sanhajo
3. Ĝanĝjang
4. Dali
5. Muping
6. Ŝjiĉang
7. Tibeto
8. Janŝi
9. Ĉjuŝu
10. Lŭojang

GRATULOJ DE NIAJ LEGANTOJ

— Resumoj de la leteroj de niaj legantoj por celebri la 35-jaran Jubileon de la fondiĝo de “El Popola Ĉinio”

Okaze de la 35-jara Jubileo de la fondiĝo de via gazeto — perlo en Esperantujo, amikoj kaj viaj fidelaj legantoj el Szczecin deziras al vi pluajn sukcesojn, feliĉon, kaj milojn, milojn da legantoj en la tuta mondo.

Estu ĉiam la paco kaj amikeco inter niaj popoloj!

30 esperantistoj el Oddzial-Filio de la Pola Esperanto-Asocio

Partopreni en la Festo de la 35-jara ekzistado de El Popola Ĉinio estas ja granda honoro kaj ĝojiga privilegio al mi. Mi sentas, ke estas vere El Popola Ĉinio, kiu malfermis la pordon inter sia lando kaj la okcidenta mondo. Estas via celo malfermi la pordon eĉ pli larĝe kaj partopreni en la realigo de la mondopaco. Precipe nun estas grava via Festo Datrevena, pro la baldaŭa okazigo de la Universala Esperanto-Kongreso inter vi.

Elkorajn gratulojn al El Popola Ĉinio.

Roan Orloff Stone (Usono)

Miaflanke mi nur tre modeste povas soleni la 35-jaran datrevenon, sed esperas, ke mi kontribuas al konigo de via revuo: mi havas nome kvar tole binditajn volumojn de EPC kaj donacas ilin al la biblioteko de nia Esperanto-grupo, por ke kiel eble plej multaj samideanoj povu legi la

valorajn artikolojn, troveblajn en ili.

Stefano Bencsik (Hungario)

Tute sincere mi gratulas al vi pro la 35-jara jubileo de via gazeto El Popola Ĉinio.

Mi persone, kaj miaj Esperanto-geamikoj en mia distrikto Karl-Marx-Stadt, ĉiam scivoleme tralegas vian ĉiam tre interesan gazeton. Kaj ni povas certigi al vi, ke via gazeto apartenas al la plej bonaj en la Esperanto-medio.

Mi legis jam en 1950 vian gazeton, mi estas do preskaŭ “veterana leganto”, ĉar en 1947 mi lernis Esperanton.

Rudolf Burmeister (DDR)

Antaŭ 35 jaroj vi ekburĝonis kaj de tiam vi iĝis belega floro. Kun via saĝeco kaj scio vi atingis vian meritan lokon inter viaj samranguloj.

Legante vin oni povas ekkoni vian belegan landon, la diligen-tecon, la kulturon kaj la gastamon de via popolo.

Lazar Nicolae (Rumanio)

En la monato majo/85, kiam nia alt-aprecata revuo festas sian 35-an datrevenon, mi permespetas aldoni mian varmkoran gratulon al ĉiuj vi, tre tre estimataj ĝojoplantistoj! . . . same, eldiri mian esperon kaj deziron ke laboremo kaj altega kvociento inte-

lekta de ĉinoj igos la periodaĵon de vi karese prizorgatan regi en Esperanto kiel ĉeforgano dum pluraj jarcentoj ĉe salutinda prospero kaj dankemo de ĝiaj multmilaroj da legantoj.

G. Otto Vaske (Brazilo)

Okaze de la 35-a datreveno de via ege aprezata gazeto EPC mi kore gratulas la tutan personaron redakcian pro la admirinda laboro kiun oni klare rimarkas leginte kaj rigardinte viajn rezultojn.

Per via gazeto, la granda belega Ĉinio malfermiĝas antaŭ la okuloj de viaj legantoj.

Ernst Pilblad (Svedio)

Je la 35-a datreveno de la fondiĝo de EPC mi gratulas elkore! Mi legis la revuon ĉirkaŭ 25 jarojn. Mi havis multan ĝojon per la revuo, kaj mi dankas pro tio la eldonintojn!

Hartmut Werdermann (FRG)

Datreveno, 35 jarojn de EPC. Certe longan vojon vi estis devigita trapaŝi. Volonte mi kredas, ke vi ofte renkontis diversajn malfacilaĵojn, sed kontentigita vi povas esti, ke vi estas farinta grandegan laboron por nia E-movado.

Kore mi gratulas al la redakcio kaj deziras saman sukceson kiel ĝis nun.

Rudi Izlakar (Jugoslavio)

Esperanto—Perspektiva Lingvo*



Lu Ĝjaŝji parolas en la celebra kunsido.


ili estas lingvo kun universaleco. Estas humuraĵo: Du sciencistoj renkontiĝis en simpozio. A demandis B: “Kiu lingvo estas internacia lingvo en scienco, laŭ via opinio?” B respondis: “Sendube la angla lingvo.” “Vi diris ne tute prave.” “Kial?” “En la scienca kampo ĝenerale oni opinias, ke la angla lingvo estas relative internacieca. Sed fakte multaj homoj parolas ne la puran anglan lingvon.” Tio signifas ke por esti internacia komuna lingvo la angla ne estas perfekta. Mi vizitis kelkajn landojn. Ni prenu Francion kiel ekzemplon. La francoj montras fortan nacian memrespekton. Kvankam la angla lingvo estas ĝenerale uzata en la lando, multaj komprenas la anglan lingvon, tamen ili ĉiam postulas interpretiston, kiam oni interparolas kun ili en la angla. Tio montras, ke la nuna informa epoko frontas al grava problemo, ke al la informa interŝanĝo mankas internacia lingvo. La ekzistantaj naciaj lingvoj ofte estas limigitaj de la malsameco de la nacio kaj socio. Ekzistis en la mondo diversaj projektoj de artefaritaj lingvoj, ne malpli ol kvindek, inklude Esperanton. Esperanto, kiun vi lernas, nur unu el ili. Jam pasis ĉ. cent jaroj de kiam aperis la “Unua Libro” publikigita de L.L. Zamenhof en 1887. Dum tiu tempo malaperis unu post alia la artefaritaj lingvoj, sed nur Esperanto postvivis. Tio atestas la vivipovon de Esperanto. Mi pensas, ke tio estas tre grava.

Kursanoj, kamaradoj! Hodiaŭ ni kunvenas por celebri la unuan datrevenon de la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj disdoni diplomojn al la lernantoj de tri E-kursoj. Mi tre ĝojas ke mi povas aŭdi ĉi tie Esperantajn paroladojn kaj disdoni diplomojn al la kursanoj. Estas gratulinde ke vi ellernis Esperanton.

De kiam la homaro ekhavis sian historion, la lingvo ludis tre gravan rolon en kontaktado kaj interkompreno. Kiom da lingvoj ekzistas en la nuna mondo? Mi ne povas respondi per preciza nombro. Sed almenaŭ mi scias,

ke la teritorio de Ĉinio estas vastega kaj troviĝas multaj dialektoj. Britio ne estas granda, tamen en ĝia ĉefurbo Londono ekzistas malsamaj anglaj lingvoj, por ne paroli pri ĝiaj dialektoj. Mi pensas, ke tio estas fenomeno serioze esplorinda. Mi aŭdis, ke ie en Siberio la viroj kaj virinoj parolas en malsamaj lingvoj. Kiam viroj kaj virinoj interparolas, la virinoj devas paroli en la lingvo de viroj. Ĉu ne pli strange? (Ĉiuj ridas) La mondo estas tiel granda, lingvoj tiel multaj. Se ne estas komuna lingvo, estas neimageble efektiviĝi facilan interŝanĝon de informoj. La naturaj lingvoj estas bonaj, sed ĝis nun neniu el

Lu Ĝjaŝji (la dekstra) kaj Tan Haŭŝeng en la kunsido



Se artefarita lingvo povas vivi cent jarojn kaj vivos plu, oni ne devas konsideri ĝin ankoraŭ kiel artefarita lingvo. Oni devas konfesi ke en certa grado ĝi jam fariĝis natura lingvo. En tiu flanko Esperanto estas perspektiva lingvo, kaj la aserto ne estas troa.

Hodiaŭ 131 kursanoj diplomiĝas. Ili estas novaj fortoj en nia akademio, relative malgranda institucio kompare kun la tuta lando. Tio estas bona afero. Mi subtenas Esperanto-movadon, kvankam mi apenaŭ scias pri Esperanto.

Ekde 1981, kiam mi komencis gvidadon de la akademio, mi ofte kontaktiĝis kun fremdlandanoj. Mi profunde sentas, ke estus pli bone, se al la internacia kontaktiĝo oni aldonus ian komunan lingvon.

Jam pasis pli ol kvindek jaroj, de kiam mi lernis en universitato. En la kvar jaroj de mia studenta vivo, lerni fremdan lingvon ne estis facile. Mi ankoraŭ memoras, ke dum mia studado en Ŝjamen-a Universitato, antaŭ ol ko-

menci regulan studon mi devis lerni en prepara kurso, kie la tri kursoj de fiziko, matematiko kaj la angla lingvo estis lektiataj angle. Komence mi ne povis respondi demandojn de instruisto, ĉar mi ne komprenis kion li diris. Post du semajnoj mi iomete komprenis. Dank' al tiu trejnado mi pli bone posedis la anglan lingvon. Poste mi lernis la germanan, francan kaj rusan lingvojn. Nun mi opinias ke tiam mi dediĉis tro da energio kaj tempo por tiuj neinternaciaj lingvoj. Ĝuste diris iu fremda inĝeniero, ke lerni Esperanton estas facile, rapide kaj ekonomie. Mi opinias, ke estas tre utile uzi facile lerneblan internacian lingvon, krom la angla lingvo kiel internacia scienca lingvo. Tiam mi estis tre juna kaj mi devas konfesi nun, ke tiam mi oferis tri kaj duonon da jaroj por lerni la anglan lingvon en la prepara kurso. La gramatikoj de la franca, germana kaj rusa lingvoj estas pli komplikaj ol tiu de la angla. Leginte vian konigadon pri Esperanto, min tiklas provo de memlernado de

Esperanto. Ĉu vi ridas, ke mi jam estas tro maljuna por tio? (Ĉiuj ridas kaj aplaŭdas) Mi havas la ambicion persisti en mia memlernado. Jus vi diris, ke persisto estas venko. Mi volas diri ke mi ĝisvenke persistos (aplaŭdoj).

Nun en nia akademio grandiĝas la esperantistaro. Des pli ĝojigas min tio, ke en la venonta jaro en Pekino okazos internacia kongreso de Esperanto. Tio estas tre bona. Krom piĝino, ni havas ankaŭ Esperanton por kontaktiĝo. Precipe mezaĝuloj kaj junuloj ne bezonas lerni tiel multajn fremdajn lingvojn, lerninte Esperanton. Kia bona ideo! Tial la afero estas subteninda. Mi kore gratulas vin pro la sukceso kaj deziras al vi kontentigan efektivigon de la ideo. Dankon!

* La aŭtoro estas prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tio ĉi estas parolado de la aŭtoro en la celebra kunveno de la unua datreveno de la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

ESPERANTO KAJ JUNAJ KRIPLULOJ

Mi estas instruisto de iu koresponda lernejo de Esperanto kaj konatiĝis kun iuj junaj kripluloj, kiuj tre ŝatas Esperanton. Iliaj agoj estas tre kortuŝaj.

Tio okazis antaŭ kelke da jaroj. Ni informiĝis el la gazeto "Ĉina Junularo", ke knabino Lingling de Ŝandong-provinco estas grava paralizulo. Ŝi batalis

kontraŭ la malsano pli ol dudek jarojn. Ŝi interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis ĝin diligente. Pro tio ni sendis al ŝi materialojn por ŝia lernado. Post nelonge ni ricevis ŝian leteron kaj sciis, ke ŝi nomiĝas Ĝang Hajdi. Ekde tiam ŝi fariĝis speciala membro de nia lernejo. Ni decidis doni specialan helpon al aliaj junaj kripluloj, kiuj ŝatas Esperanton. Post

kiam Hajdi diskoniĝis tra la lando en 1983, multaj ĵurnalistoj intervjuis nin. Bedaŭrinde, ni ne konservis ĉiujn ŝiajn leterojn, ĉar ni neniam atendis, ke tiu juna kriplulino fariĝos heroino, kaj plie en nia instruado ni renkontis multe da tiaj junuloj, kia ŝi.

Knabino Ĝu Lidŭan loĝas en la urbo Uhan de Hubej-provinco.

Kriplulino-esperantistino Ĝang Hajdi (la dua de dekstre)



*Feng Janŝeng kaj
ŝiaj kunlernantoj*



Ŝi estas kripla je la du kruroj kaj moviĝas sin apogante sur du benketoj. Ni sendis instruiston por doni al ŝi regulan helpon en la lernado. Foje pluvegis. Ŝiaj familianoj diris, ke la instruisto eble ne venos, sed ŝi kredis, ke li certe venos. Fine akurate venis la instruisto, kio pliigis ŝian memfidon al lernado. Foje ŝi per trema voĉo telefonis al mi. Kiam ŝi aŭdis min, ŝia voĉo fariĝis serena. Anstataŭ fari al mi demandon, ŝi diris, ke parolante kun mi, ŝi tre ĝojis. Poste mi sciis, ke tiam ŝi renkontis grandan malfacilon en sia vivo kaj ne povis sin deteni de tio. Ŝin kaptis melankolio kaj hezito. Fine ŝi trovis en lernado fidon kaj forton daŭre vivi. Nun ŝi lernas en progresiga Esperanto-kurso kaj volontule laboras en libro-servo.

Ni ricevis leteron de iu juna kriplulino en Ŝinĝjang. Dum certa tempo ŝi ne havis ŝancon lerni kaj labori kaj pensis, ke ŝi fariĝis ŝarĝo de la familio kaj socio.

Ŝi rakontis al ni sian ĉagrenon por ricevi de ni helpon kaj trovi novan esperon en lernado de Esperanto. Ni decidis senpage akcepti ŝin kiel nian lernanton kaj tuj skribis al ŝi. Post nelonge venis al ni ŝia respondo. Ŝi diris, ke, se nia letero atingus ŝin je unu tago malfrue, ŝi ne povus ĝin legi. Ŝi foje-refoje legis nian leteron kaj tralegis per unu spiro la libron "Esperantistoj" senditan de ni. Ŝi estis forte kortuŝita de moralaj agoj de veteranaj esperantistoj kaj decidis rekomenci sian vivon por fariĝi homo nelacigebla kaj utila al la socio kaj la popolo.

Jam en la 5-jara aĝo Ĝaŭ Hŭa perdis la du krurojn kaj unu manon. Tiu 20-jara knabino kun granda energio lernas Esperanton kaj progresas tre rapide. Ŝi ne nur mem lernas, sed eĉ organizis lernogrupon kaj fondis gazeton. Krome, ŝi ankaŭ vizitas Esperanto-kurson funkciigatan de alia lernejo. Ŝi diris: "Mi neniam vizitis lernejon, mi ne devas for-

lasi tian ŝancon." Ĉiufoje, kiam ni instruis en diversaj lokoj, ni vidis junajn kriplajn lernantojn, kiuj venis per rulseĝo aŭ lambastonoj. Ili lernis tre serioze kaj bombardis nin per multaj demandoj. Estante inter ili, oni povas bone hardi sian senton kaj animon. Ilia fervoro al Esperanto estas ekster la kompreno de la ordinaraj homoj.

Kvankam junaj kripluloj lernantaj Esperanton konsistigas tre malgrandan parton de niaj lernantoj, tamen ili estas ege fervoraj kaj diligentaj en la Esperantomovado, kiaj iuj ordinaraj homoj ne povas esti. Kiel instruisto de Esperanto, mi respektas kaj admiras ilin.

IUPAK KAJ ESPERANTO

En 1983 estis registrita la 6-miliona kemia kombinaĵo. Ĉiu kombinaĵo estas ne nur formulo sed ankaŭ nomo. La nomo devas esti tia, ke laŭ ĝi oni povu imagi formulon de la kombinaĵo kaj dezirinde ankaŭ ĝiajn ecojn. Tiun taskon nomenklaturistoj de IUPAK (Internacia Unio de Pura kaj Aplika Kemio) solvis uzante bazan principon de Esperanto — ili strikte fiksis sencojn de la sufiksoj kaj prefiksoj. Ekzemple, ĉiuj saturitaj hidrokarbonoj havas sufikson an, kombinaĵoj kun duoblaj ligoj — sufikson en, kun la trioblaj — sufikson in. Alkoholoj havas sufikson ol, sukeroj — oz, aldehidoj — al, ketonoj — on kaj tiel plu por ĉiuj klasoj de kemiaj kombinaĵoj. Sen propra sufikso restas acidoj kaj pro tio en multaj lingvoj tiujn kombinaĵojn oni nomas per du vortoj. Germanoj kaj japanoj uzas por tiu klaso kunmetitajn vortojn kun finaĵoj säure kaj san (speciala hieroglifo), kio estas sendube pli racia ol duvortaj nomoj.

Oponante al mia propono pri ac-afikso, d-ro W. J. Nijweld skribis (EPĈ 84/1, BI 84/6-7), ke la vorto "acid" ekzistas en granda nombro da lingvoj. Jes, sed ekzistas pli granda nombro da lingvoj, kiuj uzas por tiu ke-

mia klaso aliajn nomojn. Krome, ekzistas almenaŭ du grandaj lingvoj (G., J), en kiuj diskutata nomo estas uzata sufikse. Kial ni ne prenu tiujn du lingvojn kiel modelon por IL? Kial ni forĵetas german-japanan modelon kaj akceptas la angla-rusan? La unua ja estas pli racia. Kontraŭ la dua oponaĵo de d-ro Nijweld mi metas ĉi tie la frazon el letero de d-rino I. Gal: ac-nomenklaturado tute ne ofendas la preskribojn de IUPAK, havas la avantaĝon de unuvortaj nomoj por acidoj, kontentigas la principon de neceso kaj sufiĉo.

D-ro Nijweld skribis en menciita artikolo: Sufikso -ac verŝajne estus malfacile transprenbla en la diversaj naciaj lingvoj. Antaŭ du jaroj mi atente ekzamenadis aplikeblecon de ac-sufikso por slavaj lingvoj kaj venis al konkludo ke ĝi taŭgas por ĉiuj slavaj lingvoj (la artikolo pri tio verŝajne aperos en "Filologo"). La sufikso taŭgas ankaŭ por la germana (Schwefelsäure-Schwefelaze ks). Mi konsultis d-ron S. Yamazoe ĉu aco havas en la japana iun specialan sencon kaj li siaflanke konsultis pri la samo kun ĉinoj. Kaj en la japana kaj ĉina lingvoj la vorto aco ne havas iun specialan sencon kaj povas esti uzata en tiulingvaj ke-

miaj nomenklaturaj en la senco de acido. Tiukaze koncernaj hieroglifoj ricevas internacian prononcon.

Ĉu ni devas atendi ĝis kiam IUPAK-nomenklaturistoj venkos embarason kun sufikso por acidoj aŭ ni memstare enkonduku ĝin en la Internacian Lingvon? IUPAK-nomenklaturado esence estas Esperanta nomenklaturado, pro tio ni rajtas kaj devas elpaŝi pionire sur tiu tereno.

Fine, mi volas substreki, ke Internacia Lingvo ne estas nura aglomerato el la naciaj, ĝi estas memstara lingvo kun sia propra vizaĝo. Ĉefaj trajtoj de tiu vizaĝo estas logikeco, racieco, elegantececo. Ni ne distordu tiujn trajtojn strebante adaptiĝi al naciaj lingvoj.

La 28-an de junio 1984.



Akvoguto kaj Ŝtupo

Pluvis. La akvo defalis de tegmento guton post guton sur ŝtupon.

La ŝtupo senzorge ridis: "Ho, tre interese! Ĉu vi volas bani aŭ grati min? Vi ne povas kon-



tentigi min per via servo. Por bani min, via kvanto ne sufiĉas; por grati min, vi estas tro malforta."

La akvoguto diris: "Mi vin nek banas nek gratas, sed mi intencas trabori vin!"

La ŝtupo ekridegis: "Ne sonĝu pri tio! Mi neniam aŭdis, ke akvoguto povas trabori ŝtonon."

Spite al tio, la akvoguto senĉese falis sur la ŝtupon.

En serena tago la akvoguto, kompreneble, malaperis kaj la ŝtupo tute forgesis la aferon.

Dum pluvado, la ŝtupo tute ne zorgis pri tiu bagatela afero.

La tempo pasis jaron post jaro. Jam kelkcent jaroj forpasis ne rimarkite.

Fine, la ŝtupo estis traborita de la akvoguto.

Arbo kaj Grundo

Arbosemo falis en grundon, ĝermis kaj rapide kreskis. Post ĉ. dudek jaroj ĝi jam fariĝis granda arbo.

Ĉiuj preterpasantoj admiris ĝian imponecon. Tial la arbo fariĝis fierega.

Forte ventis kaj pluvegis. Iuj el la herboj kaj arbetoj ĉirkaŭ la arbo estis rompita kaj aliaj estis forblovitaj. Sed la arbo perdis nur kelkajn foliojn. Birdoj kaj sciuroj laŭdis ĝin: "Sen protekto de la arbo, ni certe mortus en ŝtormo." Sekve la fiero de la arbo kreskis des pli. Ĝi gaje diris: "En la mondo nur mi estas la plej granda!"

Subite, ĝi aŭdis voĉon venintan de malsupre: "Fermu vian buŝaĉon, arogantulo!"

La arbo kun miro demandis: "Kiu vi estas?"

"Mi estas grundo."

La arbo ridis: "Haha! kara grundo, estas vi, sentaŭgulo!"

La grundo diris: "Sendankemulo! Estas mi, kiu vin mamnutras kaj kreskigas. Sed vi estas tiel aroganta. Vi enradikiĝas en mia korpo. Ju pli forte mi vin ĉirkaŭprenas, des pli profunde vi enradikiĝas. Tial forta vento kaj torenta pluvo ne povas vin

faligi. Ĉu vi povus fieri, se vi forlasus min?"

Nur je tio la arbo senvorte mallevis sian kapon.



UNUA DATREVENO DE LA FONDIĜO DE LA SCIENCISTA-TEKNIKISTA E-ASOCIO SUB LA ĈINA AKADEMIO DE SCIENCIOJ

La 21-an de junio ĉi-jare, la Sciencista-Teknikista E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis kunsidon por celebri la 1-an datrevenon de la fondiĝo de ĉi tiu E-Asocio. En ĝi partoprenis prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj Lu Ĝjaŝji, fama meĥanikisto Tan Haŭŝeng k.a. pli ol 100 personoj. En la kunsido, Lu Ĝjaŝji faris entuziasman parolon kaj donis diplomon al la gelnantoj de tri E-kursoj. Tan Haŭŝeng esperis, ke Esperanto plene ludos sian rolon en la interfluo de scienco kaj tekniko.


NEDEVIGAJ E-KURSOJ EN KVAR ALTLERNEJOJ

En la unua duono de la kuranta jaro, nedevegaj E-kursoj funkciis en pliaj 4 altlernejoj, nome la Ŝinŝjang-a Pedagogia Lernejo en Henan-provinco, la Ĉjufu-a Normala Instituto en Ŝandong-provinco, la Tonghŭa-a Normala Instituto en Ĝilin-provinco kaj la Liming-a Universitato en Ĉjŭanĝoŭ en Fuĝjan-provinco.

ESPERANTO EN HEJMLOKO DE KONFUCEO

En marto ĉi-jare, la Ĉjufu-a Normala Instituto en Ŝandong-provinco fondis E-kurson por la klaso 1984 de la arta fakultato. En la lernado partoprenis ankaŭ lernantoj kaj instruistoj de la fakultatoj ĉin-lingva, fremd-lingva, sporta kaj politika.

La instituto oficiale agnoskis ekzamenon de Esperanto kiel ekzamenon de unu el la fremdlingvoj lernendaj por la studentoj. Ĝi sendis instruiston al E-kurso en la Ŝanhaja Fremdlingva Insti-



La kunvenejo por celebri la 1-an datrevenon de la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista E-Asocio

tuto, por ke Esperanto povu esti daŭre instruata en la instituto.

INTERESA AKTIVADO DE ESPERANTISTOJ

La 28-an de aprilo ĉi-jare, okazis alloga aktivado de Esperanto en la pekina parko Ziĝu. Kelkdekoj da junpioniroj kaj dekelkaj maljunuloj kune organizis amuzan kunvenon "respekti maljunulojn kaj ami infanojn". La geknaboj estas lernantoj el postlecionhoraj E-kursoj de du elementaj lernejoj en Pekino kaj la maljunuloj — veteranaj esperantistoj el rondoj de kulturo, edukado kaj eldonado. Ili interparolis en Esperanto kaj

prezentis programerojn per Esperanto. La E-kursoj de ĉi tiuj elementaj lernejoj estas iniciatitaj de la Ĉina Asocio de Edukado por Maljunuloj kaj la Pekina Asocio de Veteranaj Esperantistoj.

FONDIĜO DE PLIAJ E-ORGANIZOJ

La 26-an de majo ĉi-jare okazis en Nanĉang, ĉefurbo de Ĝjangŝji-provinco, kunveno de fondiĝo de la E-Asocio de Ĝjangŝji-provinco. En la kunveno oni elektis prezidanton kaj du vicprezidantojn de la asocio.

Krome, la 18-an de aprilo ĉi-jare, fondiĝis la E-Asocio de Hefej

En la amuza kunveno "Respekti maljunulojn kaj ami infanojn"



de Anhuĵ-provinco. La respondeculoj de la Federacio de Sociencaj Asocioj kaj E-Asocio de la provinco partoprenis en ĝia fondiĝa kunveno. La 24-an de aprilo ĉi-jare, okazis la fondkunveno de la E-Asocio de Harbin. La respondeculo de la Harbina Komitato de KPC faris gratulan parolon en la kunveno. Ĝin ĉeestis esperantistoj, subtenantoj, membroj de E-instituto kaj aliaj, entute pli ol 250 personoj. En la kunveno oni establis konsultojn, vendis Esperantajn librojn kaj gazetojn kaj varbis abonantojn.

En tiu periodo fondiĝis E-Asocioj de Ljaŭning-provinco, Dandong kaj Anŝan en Ljaŭning-provinco, Ĉjiĉjihar en Hejlongĝjang-provinco, Ŝinŝjang kaj Hebi en Henan-provinco, Ĝjanli en Hubej-provinco, Liŭgoŭ en la Ĝuangŝjia Ĝuang-a Aŭtonoma Regiono, Ganĝoŭ en Ĝjangŝji-provinco, Tonglu en Ĝeĝjang-provinco, kaj Sciencista-Teknikista E-Asocio de Ŝaŝi de Hubej-provinco. La fondiĝo de ĉi tiuj E-organizoj estis subtenataj de la lokaj registaroj kaj gvidaj departementoj de la provincoj.

Partoprenantoj de la fondiĝo de la E-Asocio de Ĝjangŝji-provinco



La fondkunveno de la Esperanto-Asocio de Hefej



INFORMO EL BULGARIO

Jam ekzistas Centro por Scienc-Esplora kaj Inĝenier-Enkonduka Agado ĉe la Centra Kooperativa Unuiĝo en Sofia. Grave estas, ke ĝia ĝenerala direktoro profesoro Nikola Valev estas preta utiligi Esperanton por profesiaj celoj. La kooperativa Scienca Centro prilaboras diversajn temojn.

SIMPOZIO PRI INTERLINGVISTIKO

De la 27-a de Aprilo ĝis la 1-a de Majo, 1985 okazis en Varsovio la 13-a Scienca Interlingvistika Simpozio, kiun organizis Akademiana Centro Interlingvistika funkcianta kadre de Asocio de Polaj Studentoj. La simpozion aŭspicias Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo de Universala Esperanto-Asocio. Entute partoprenis 43 personoj, studentoj el Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, FRG, Hinda Unio, Hungario, Nederlando, Japanio, Okcidenta Berlino, Pollando kaj Usono.

AKTIVAS VENEZUELO

(1) La unua esperantisto en Maracaibo estas D-ro Jesus Enrique Lossada. En la komenco de la 20-a jarcento li lernis Esperanton kaj propagandis ĝin. En la pasinta jaro la tieaj esperantistoj proklamis lin Patro de la loka esperantismo; (2) En marto ĉi-jare sub la gvidado de la E-klubo komenciĝis forumoj pri Esperanto en marabaj baj liceoj (mezgradaj lernejoj). En liceo "Alejandro Fuenmayor" okazis la unua forumo kiun ĉeestis pli ol 200 personoj; (3) Je la 20-a de aprilo 1985 komenciĝis serio da lecionoj pri Esperanto en la loka ĵurnalo "Panorama" dank' al la klopodo de tiea Esperanto-Klubo. Tio estas unuafoja por Venezuelo.

BRAVA ELEKTREVELDISTINO

de LI JINGHŪA



Liū Gujĝi en veldado

Ordinara veldistino tamen akiris al si grandan famon. Ŝi estas Liū Gujĝi, kiu la unua de la ĉina petrolkampo Bohaj ricevis internacian diplomon de supera elektreveldisto.

MI NEPRE GAJNOS FIDON

Aŭtune de 1971 Liū Gujĝi, 19-jara vilaĝa knabino, estis elektita kaj sendita de siaj vilaĝanoj al la Tjanĝin-a Filio de la petrolkompanio Bohaj por labori en ĝi kiel ĝia laboristino. Ŝi laboris tie dek kvar jarojn. Kiel neforgesebla estas la vojo dum tiu tempo!

En 1981 la Platforma Fabriko de la nomita kompanio kontrak-

tis pri farado de la unua framo de konduktubo konforma al la internaciaj normoj. Laŭ la kontrakto nur tiuj, kiuj post trejnado kaj ekzameno ricevis aprobon de la internaciaj aŭtoritatoj pri veldado kune invititaj de Ĉinio kaj Japanio — specialistoj de la Usona Ŝip-buroo — kaj ĝian 6a gradan ateston, havas rajton partopreni en la laboro. Por plenumi la kontrakton kun la eksterlando, la fabriko decidis inviti fremdlandajn specialistojn trejni elektreveldistojn laŭ periodoj kaj en grupoj. Liū Gujĝi, konata pro sia braveco, estis elektita. Ŝi estis la sola virino el la unuaj ler-

nantoj.

Ĝuste tiam estis varma somero. Ŝvito jam malsekigis la vestojn nur post momento da laboro. Post kelkaj tagoj jam aperis sur la tuta korpo de Liū Gujĝi ruĝaj ŝvelaĵetoj, kiuj en ŝvito ŝin dolorigis kiel kudriloj. Plie ŝi sentis brulan doloron de veziketoj kaŭzita de sparkoj dum veldado. Ĉion ĉi la malcedema veldistino eltenis. Sed la plej neeltenebla por ŝi estis la duba rigardo de la fremdlandaj specialistoj.

Ŝi malsukcesis en la unua ekzameno dum la trejnado pro nenorma junto kontrolita per X-radioj. Post tio ĉiufoje, kiam la fremdlandaj specialistoj venis al la laborloko, ili donis al aliaj veldistoj bonajn konsilojn, ne ĵetante eĉ unu rigardon al ŝia laboraĵo.

Tio ofendis ŝian memestimon kaj la obstina veldistino larmis.

“Ĉu mi montru al ili larmojn? Ne! Mi devas montri al ili la bravecon de la ĉinaj virinoj!”

Forviŝinte la larmojn, ŝi revigliĝis kaj denove submetis sin al peniga trejnado. . .

La fremdlandaj specialistoj refoje venis por doni konsilojn, ĉar baldaŭ venos la tago de oficiala ekzameno. Ekvidinte la laboraĵon de Liū Gujĝi, ili forte miris: Kiel perfekta, pura, glata kaj ebena laboraĵo!

“Ĉu vi veldis ĝin?” demandis iu el la specialistoj.

“Jes,” respondis ŝi simple.

“Ĉu sur la plej favora pozicio?”

“Ne.”

La specialisto prenis du veldobastonetojn ĉeloke, debatis iliajn ekstremajn partojn kaj diris: “Veldu denove, sen sparkoj!”

Ektimis ŝi, pensante: Kiel? Sen sparkoj? Tio estas malfacila eĉ por veteranaj veldistoj.

“Estu kuraĝa. Veldu do,” ŝiaj kolegoj kuraĝigis.

Prezinte la veldilon, ŝi ekvoldis kun retenata spirado.

Ricevinte elektron, la veldilo moviĝis kune kun veldobastoneto, kaj glata kaj ebena veldaĵo plenumiĝis. La fremdlandaj specialistoj ne povis ne kredi.

Post unu semajno Liŭ Gujĝi sukcesis trapasi la ekzamenon kaj fariĝis la unua 6a-grada veldistino de sia kompanio. La ĉefa ekzamenanto, specialisto de la Usona Ŝip-buroo, laŭdis, ke la ĉinaj virinoj estas bravaj.

ŜIAJ VELDAĴOJ ESTAS FIDINDAJ

En la konstruado de framo de konduktubo Liŭ Gujĝi respondis pri riparado, kio estis ŝlosila laboro. Oni devis fari refojan riparon, se oni neĝuste difinis la riparon pozicion aŭ nur iom malbone riparis. Foje ricevinte laboron foton, ŝi kun 10-15 kilogramoj da instrumentoj grimpis sur framon de konduktubo je pli ol 20 metroj altan. Elpreninte la foton kaj sin preparinte por veldado, ŝi trovis etan diferencon inter la foto kaj junto. Ŝi kontroladis ilin plurajn fojojn, eĉ ŝiaj manoj frostiĝis, sed ŝi ankoraŭ ne



povis identigi ilin. Ŝi do sin turnis al la fotinto. Aĥ, ĉi tiu donis la eraran numeron. Tiamaniere akcidento estis evitita.

La tekniko de Liŭ Gujĝi estas tiel alta, ke ŝi povas aldoni “karnon” al neperfektaj materialoj. Iun posttagmezon, kiam ŝi estis revenonta hejmen, iu inĝeniero diris al ŝi, ke sin trovas du grandaj ŝtalaj platoj por trabo de antaŭfarita kasono, kiuj postulas tujan riparon pro manko de longeco de 20-30 mm. kaŭzita de miskalkulo. Ŝi laboris ĝis la dua horo de la sekvanta tago kune kun sia grupestro por elkreskigi “karnon” de la ŝtalaj platoj, kiu ne videblas ekstere kaj ne malaltigas la kvaliton.

Neniu povas kalkuli, kiom da juntoj ŝi veldis en la lastaj jaroj. En 1984 ŝi traktis 46 X-radiajn fotojn kaj riparis 30 alies laboraĵojn ultrasono kontrolitajn, kaj el ŝiaj riparaĵoj 98.5% atingis la normojn. La japanaj specialistoj tre admiris ŝian perfektan teknikon kaj konfidis al la eksteraĵo de la veldaĵoj faritaj de ŝi.

Kiel malfacila estas la vojo de nekredo ĝis plena konfido! Kaj tion ŝi spertis.

ŜI ESTAS BRAVA MODELA LABORISTINO

Liŭ Gujĝi estis elektita kiel avangarda laboristino en sinsekvaj 14 jaroj, escepte de unu jaro pro sia postakuŝa ripozo. En 1982 kaj 1983 ŝi estis elektita kiel kompania kaj urba modela laboristino kaj ankaŭ kiel portantino de la Standardo de la 8-a de Marto de la lando.

Liŭ Gujĝi famiĝis, kaj ŝiaj kolegoj diris: “Ŝi ne ŝanĝiĝis, ŝi restas ankoraŭ tiel brava.”

La aerrabotado estas malpura, laciga kaj sufoka. Sed ŝi sola plenumis ĉiujn laborojn de aerrabotado en la flanko de U A — A.

Ŝi laboras ĉiam kun obstineco kaj ne ripozas ne fininte sian laboron. Foje sur junto inter du tuboj kun diametro de nur 457 mm. aperis neharmonia kunfandaĵo. Antaŭ ol ripari ĝin, oni devas poluri ĝin per smirga rado, tio estas laboro kun granda malfacilo. Liŭ Gujĝi laboris super ĝi pli ol du horojn sen ripozo. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis de intensa arka lumo, kaj larmoj senĉese ruliĝis el ŝiaj okuloj. La laboristoj laŭdis: “Modela laboristino Liŭ ja estas fiero de nia tuta veldistaro!”

ŜANHAJO—ĈARMA URBO

de ŬEJ LJAŬ

Ŝanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio, situas ĉe la suda flanko de la enfluejo de Jangzi-rivero, la tria riverego de la mondo.

Origine ĉi tie estis fiŝista vilaĝo. En la fino de la 13-a jarcento Ŝanhajo havis prosperan tekstilan industrion kaj fariĝis centro de la ĉina tekstila industrio, kies produktoj vendiĝis tra la tuta lando. En la komenco de la 19-a jarcento Ŝanhajo jam estis plej prospera urbo de Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ekonomio de Ŝanhajo senprecedence

disvolviĝis kaj la urbo fariĝis grava industria bazo de Ĉinio.


Nemalmultaj fremdlandanoj, kiuj vizitas Ŝanhajon, ŝatas sin meti en la homfluron sur la strato Nankino por laŭeble rigardi ĝian ĉarmon kaj prosperon. Ambaŭflanke de la strato longa 5 kilometrojn staras plejparto de la famaj magazenoj, butikoj, restoracioj, hoteloj kaj amuzejoj de la urbo. Tie oni povas aĉeti al si dezirataĵon, frandi famajn pladojn kaj kukojn kaj spekti operojn, dramojn kaj akrobataĵojn kun lokaj gustoj. Kaj krome, na-

vetaj veturiloj, homfluoj kaj buntaj montrofenestroj donas al la strato intensan orientan guston.

Ĉe la orienta fino de la strato estas la bordo de la rivero Hŭangpu. Veturante per plezurŝipo en la rivero, oni povas ĝui la originalan ĉarman pejzaĝon de la havenurbo.

Ŝipveturante, oni povas vidi la plej fruan parkon de Ŝanhajo, kiu estis konstruita de lokanoj per tero prenita dum riverfosado en la dua duono de la 19-a jarcento.

Parto de Ŝanhajo



Pli antaŭen, la turistoj povas vidi, ke ĉe la okcidenta bordo de la rivero staras fabrikaj konstruaĵoj unu apud alia, sur la rivero dissemiĝas ankroboj kaj navetas ĉinaj kaj fremdlandaj ŝipoj, kio vidigas vigecon de la havenurbo.

Kiam la plezurŝipo atingas la riveran buŝon Usong, tuj antaŭ la okuloj prezentiĝas la senlima akvo. La turistoj povas ĉirkaŭrigardi sur la ferdeko grandiozan Jangzi-riveron, la unuan grandan riveron de Ĉinio.


Ĉi tie oni povas trovi ankaŭ la akvofluojn malklar-flavan, klaran kaj grizan, kune fluantajn, sed kolore nemiksiĝantajn unu kun alia, kio faris miraklan fenomenon. Tie kunfluas la riveroj

Hŭangpu kaj Jangzi kaj la flusakvo de la Orienta Ĉina Maro.

En la nordokcidenta parto de la urbo estas templo. En ĝi estas unu blankjada budho veninta el Birmo. Tial ĝi nomiĝas la Templo de Jada Budho.

La templo estas konstruita delikate kaj antaŭ ĝia pordo staras ekranmuro. En la templo troviĝas la halo de Ĉiela Reĝo, la halo de Mahaviro kaj la turo de Jada Budho. En la turo sidas jada budho, alta 1.9 metrojn kaj larĝa 1.34 metrojn, sur la soklo kun inkrustitaj perloj kaj juveloj. Okcidente de la templo estas la Halo de Kuŝanta Budho, kie estas unu kuŝanta jada statuo de

La nova hotelo Ŝanhajo




Famaj kuiristoj de Ĝing'an-restoracio preparas bongustajn pladojn.

Sakjamunio en nirvano. En la templo konserviĝas multaj antikvaj skulptitaj statuoj, raraj pentraĵoj kaj pli ol 7 000 volumoj de la sutro Dazang kaj aliaj budhismaĵoj, inter ili la sutro Dazang havas 1 662 volumojn. La templo estas unu el la kompletaj sutrokonservejoj de Ĉinio.

En ĝi servas vegetara restoracio, kie oni povas frandi vegetarajn pladojn.

En la orienta parto de la urbo kuŝas la ĝardeno Jujŭan, kiu estis ekkonstruita en 1559. La ĝardeno kun areo de ĉ. 2 hektaroj estis delikate projektita kaj harmonie dispoziita. Ĝi vidiĝas granda kun suda arkitektura stilo de Ming- kaj Ĉing-dinastioj (1368—1911). La ĝardeno havas pli ol 40 ĉefajn vidindaĵojn, kiuj estas apartigitaj de 5 zigzagaj muroj en 6 partojn kun originaleco. La konstruado de la ĝardeno daŭris 18 jarojn.

Ĉe la suda flanko de la ĝardeno estas la malnova sidejo de la antaŭa Templo de Urba Dio. Ĉe la okcidenta flanko estas komerca kvartalo, kies aspekto konservas malnovan tipan stilon



Gardeno Dagŭanjŭan

de antikva urba foiro sude de Jangzi-rivero.

En Ŝanhajo estas ankoraŭ aliaj pitoreskejoj, kiaj la templo Longhŭa, zoologia ĝardeno, botanika ĝardeno k. a. Krome, la pitoreskejo de Djanŝan-lago, kiu komencis konstruiĝi en 1979, havas rudimentan formon kaj parto de ĝiaj konstruoj estas jam finita. Ankaŭ estas finita parto de la ĝardeno Dagŭanjŭan, konstruata laŭ la priskribo en la fama ĉina klasika romano "Songŝo en Ruĝa Buduaro". La ĝardeno estos finkonstruita en 1987.

Ŝanhajo estas unu el la ĉefaj

bazoj de metiartaĵoj de Ĉinio, kiu posedas teknikojn pri skulptado, teks-brodado kaj metala prilaborado. La metiartaĵoj estas projektitaj kun aparta originaleco, faritaj delikate kaj tial multe ŝatataj de en- kaj eksterlandaj aĉetantoj.

La lanfadena brodaĵo de Ŝanhajo povas lerte prezenti diversajn temojn kaj havas ĉarmon de arto. Ekz., la lanfadena brodaĵo "Granda Muro" estas grandioza, impona kaj reliefa, dum tiu de "Mona Lisa" estas farita delikate kaj fidela al la originalo. En la lastaj jaroj tiu brodarto havis

novan disvolviĝon kaj la brodmetodo fariĝas pli riĉa. Kaj krome, oni aplikis teknikon de duobla brodado, kreis duoblan lanfadenan brodadon kaj pluapaŝe altigas la artan esprimon.

Ŝanhajo havas famajn kuiristojn venintajn de diversaj lokoj de Ĉinio. Dank' al tio, formiĝis ŝanhaja kuirarto fama tra Ĉinio. La kuiristoj de ŝanhajaj pladoj estas lertaj en stufado, stufetado, fritado ktp. La kuirarto por prepari vegetarajn pladojn estas aparte eminenta. Per legomoj, sojfabajoj, sekaj fungoj, orelfungoj kaj bambuido, oni delikate preparas diversajn bongustajn pladojn, kvazaŭ ili estus preparitaj el viando de fiŝo kaj birdo. Ili havas versimilan formon kaj agrablan guston. Ili ne odoras fiŝe kaj grase, sed ĝuigas per siaj koloro, aromo, gusto kaj formo de vianda plado. Tio mirigas ĉiujn frandantojn. En Ŝanhajo funkcias ankaŭ okcidentaj restoracioj kun angla, franca, germana, itala kaj rusa kuirartoj.

Ŝanhajo havas dekelkajn hotelojn kun dekmil litoj por fremdlandaj turistoj. Inter ili la hoteloj Ĝingĝang, Ŝanhajo kaj Ŝjiĝjau estas unuaklasaj en Ĉinio.

Pitoreskejo ĉe Djanŝan-lago






Parto de Šanhajo

La Naükurbiğa Ponto antaũ la Gardeno Jujūan





Nova pitoreskejo Jihong-parko en la antaŭurbo



La bodisatvo en la Templo de Jada Budho

Vizitantoj rigardas fiŝojn en la ĝardeno Jujŭan.






Veturado sur Hŭangpu-rivero



En strato de Ŝanhajo





HÜANG ŠILIN kaj LIŬ ĜONGFU:

ANTIĤVA URBO

ANTAŬ


3 600 JAROJ

*La tuta subtera kanalo sub
la voja surfaco de la orienta
dua pordego*

de LIŬ ĜONGFU

*La sidejo de urbopordego de Sang-dinastio
ĉe Ŝiŝjangou*

de ŜJŬE JUJAŬ



Ŝja-dinastio fondita en la 21-a aŭ 22-a jc. a.K. estis la unua dinastio en ŝtata formo laŭ legendoj. En la 16-a jarcento a. K. alia tribo sub la gvido de Tang renversis Ŝja kaj fondis Ŝang-dinastion, kiu prenis Ŝjibon kiel sian ĉefurbon por firmigi la regpotencon kaj grandigi la teritorion. Tiu prahistorio estis simple notita en antikva literaturo de Ĉinio, sed mankis al ĝi praktikaj atestoj. Depost la 19-a jarcento oni trovis, en la urba ruino de la lasta periodo de Ŝang-dinastio apud la nuna urbo Anjang de Henan-provinco, grandan kvanton da testudaj ŝeloj, ostoj kaj bronzaĵoj. La skribaĵoj sur ili konstatis la socian formon kaj kulturajn karakterizaĵojn de la lasta periodo de Ŝang-dinastio, sed ne klare rakontis la historion

de la antaŭa periodo de Ŝang-dinastio kaj tiun de Ŝja-dinastio.

Antaŭ nelonge, la Arkeologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj trovis ĉe Ŝiŝjanggoŭ de Janŝi-gubernio Henan-provinco sidejon de urbo je la 16-17-a jc. a. K. kaj unupaŝe determinis, ke ĝi estis Ŝjibo, la ĉefurbo de Ŝang-dinastio en la komenca periodo. Tio estas grava eltrovo de la ĉinaj arkeologoj en la lastaj jaroj.

La tuta urbo estas sub la tero. Post prifosado kaj ordigo oni trovis, ke ĝia urbomuro konstruita el ramita tero larĝas 16-24 metrojn. La urbomura ebena estas rektangula. La norda muro longas je 1 240 metroj, la okcidenta je 1 710 metroj kaj la orienta je 1 640 metroj kun du kurbiĝoj, la

suda muro estis detruita de Lŭoŝuj-rivero. La totala urboareo estas ĉ. 2 milionoj da kvadrataj metroj. La norda muro havis unu pordegon, la orienta kaj okcidenta muroj po tri pordegojn kun fundamente simetriaj situoj, krom la pordegoj orienta dua kaj okcidenta dua.


La urbopordegoj interkomunikiĝas per larĝaj stratoj. La trovitaj stratoj ĝenerale estis larĝaj je 6-10 metroj. La interkrucitaj stratoj jam fundamente formis strukturon de ŝak-tabulo — la tradician strukturon de la postaj ĉinaj urboj.

Iom pli sude de la urbomezo, oni trovis tri urbetojn, kies centro ŝajne estis palaca urbo en kvadrata formo, ĉiu flanko longas ĉ. 200 metrojn. En ĝia mezo

La norda flanko de la subtera drena kanalo sub la voja surfaco de la orienta dua pordego

de LIŬ ĜONGFU





Historiaj restaĵoj trovitaj ĉe la ruino

troviĝas pluraj grandaj palacaj bazoj. La elfosita konstruaĵo n-ro 4, kiu longas je 36 metroj de la oriento al la okcidento kaj je 11 metroj de la sudo al la nordo. Ĝi situis sur teraso de ramita tero kaj hodiaŭ estas ankoraŭ pli alta je duona metro ol la tersurfaco. La palaco estis ferma konstruaĵo, ĉirkaŭita de koridoroj en la oriento, okcidento kaj sudo. Tie oni elterigis multajn bronzaĵojn kaj jadajn sagpintojn, aŭguraĵojn, ostojn, glazurajn ceramikaĵojn k. a.


La aliaj du urbetoj estis dekstre kaj maldekstre de ĝi en formo rektangula. Ilia areo estis malpli

granda ol tiu de la palaca urbo, en ĝi la domoj plejparte estis en vicoj, eble ili estis uzataj por deponi armilojn, grenon kaj garnizonigi armeon.

Sub la voja surfaco de la orienta dua pordego, profunde je duona metro, oni trovis subteran drenan kanalon, kies muroj estis masonitaj el ŝtonoj, inter la muroj staris lignaj fostoj. La kanalo estis kovrita de lignaj tabuloj. La kanala fundo estis masonita per ŝtonpecoj kaj skvamformaj laŭ direkto de akvofluo. La subtera drena kanalo longas je 800 metroj. La kanalo racie solvis la problemon, kiel elkonduki mal-

puran akvon el la urbo, kaj ankaŭ montris la elstarajn atingojn de la antaŭa periodo de Ŝang-dinastio en la urba konstruado.

En la urboruino oni trovis ankaŭ pli ol 30 tombojn de Ŝang-dinastio kaj elterigis el ili bronzaĵojn kaj tranĉilojn, bronzaĵojn kaj jadajn sagpintojn, jadajn tranĉilojn kaj ornamaĵojn kaj ceramikaĵojn. Laŭ la determino de C 14 (reviziita laŭ arba jarringo), la urbo ekzistis antaŭ 3 545 jaroj. El tio oni asertas, ke la urbo konstruiĝis en la antaŭa periodo de Ŝang-dinastio. La ĉina historia literatura verko "Han Ŝu" notis, ke "Ŝiŝjang estis la ĉefurbo de Jin (t. e. Ŝang)". Poste, pluraj verkoj havis kompare ĝustajn notojn pri la konkreta situo de Ŝjibo, de tio oni povas determini, ke tiu antikva urbo estis Ŝjibo, la ĉefurbo de Ŝang-dinastio en la antaŭa periodo. La eltrovo de la ĉefurbo pluapasa akcelas studadon pri la historio de Ŝja-dinastio. Tio multe akcelos esploradon pri la kulturo kaj ŝtata deveno de Ŝja-dinastio kaj pri la disvolviĝo de la ĉinaj urboj.



La konstruaĵo n-ro 4 en la palaca bazo n-ro 1 de la sidejo de urbo en Sang-dinastio ĉe Ŝiŝjangoŭ
de HAN JŬE

POR ARDIGI ILIAN MALFRUAN AMON

“Laŭ kriterio de nia socio mi havas belan vizaĝon kaj interese pri diversaj aferoj. Mi laboras en kultura institucio post la diplomitiĝo en la ĉinlingva fakultato de iu universitato. Sed mi malsukcesis svatiĝi kelkfoje. Mi ne povis trovi junulon, kiu konas la varolon de mia entrepreno kaj volas subteni min. Nun iuj junuloj, influitaj de la feŭdisma ideologio, opinias, ke ĉiaokaze mi ne estas milda bonkora virino esperata de ili.”

Mia amikino en sia letero verŝis al mi la supran ĉagrenon.

Tio ne estas hazarda ekzemplo. Nun en Ĉinio estas malfacile por multaj ĉ. 30-jaraj bone edukitaj virinoj fianĉiniĝi al tiuj, kiuj havas la saman klerecon kiel ili kaj subtenas ilian entreprenon. Laŭ la plej nova statistiko, en Pekino estas pli ol 156 000 gefraŭloj ĉ. 30-jaraj.

Sociologoj ĉiam serĉas la kaŭzojn de la malfacilo de relative aĝaj gefraŭloj kaj esploras la vidpunkton de la nunaj gejunuloj pri la valoro de geedziĝo.

Ĝenerale oni opinias, ke la ĉina tradicia diferenco de geed-

ziĝo-aĝoj kaj la tro rapida kresko de la loĝantaro en la 50-aj jaroj estas la unua kaŭzo, kial la relative aĝaj junulinoj ne trovis taŭgajn amatojn. La enketo montras, ke en Pekino plejparto de la edzoj du jarojn pli aĝas ol iliaj edzinoj. En 1950 en Pekino naskiĝis 41 130 knaboj, sed en 1952, 51 370 knabinoj, tiel ke superfluis junulinoj, kiuj deziris fianĉiniĝi al junuloj je du jaroj pli aĝaj ol ili.

Se nur ekzistus la aĝo-diferenco, la problemo de relative aĝaj gejunuloj ne povus vekti la aten-

Interparolo kun fraŭlinoj multe super la edziĝtaŭga aĝo



ton de la tuta socio. Ĉi tie troviĝas ankaŭ la fianĉiĝa kriterio. Influate de la tradicia moro "oni fianĉiniĝas al kapabla viro kaj fianĉiĝas al bela virino," iuj junulinoj opinias, ke nur junuloj, kiuj havas klarecon egalan aŭ superan al la ilia kaj okupas relative altan socian pozicion, estas iliaj idealaj amatoj. Aliaj relative aĝaj junulinoj, kvankam ne edukitaj en altlernejo, opinias, ke ili ne estos respektindaj kaj esperigaj, se ili edziniĝos al domkonstruistoj, stratpurigistoj, transportistoj aŭ ministoj. Tiel ili preterlasis plian okazon por fianĉiĝo.

La junuloj havas alian kriterion por elekti amatojn. La tabelo de enskribitoj en iu svatagentejo en Kantono montras, ke 54.2% de la pli-ol-30-jaraj fraŭloj ne interesiĝas pri la klareco de la fraŭlinoj. Neniu el la 16 junuloj diplomitaj el universitato volas edziĝi al junulino, kiu havas egalan klarecon kiel li. Iu 31-jara esplora studento de la Poŝta kaj Telekomunika Instituto diris:

"Mi esperas, ke mia estonta edzino okupiĝos multe pri dommas-trumado. Se ni ambaŭ estos entreprenemaj en nia kariero, neniu el ni povos atingi sukceson." Tian personon havas parto de la junuloj. Iu junulo diris malkaŝe, ke li deziras edzinon, kiu scias prepari manĝon, kaj se eble, li preferas junan, belan kaj mildan.

En Ĉinio estas alia kaŭzo. En la dek-jara politika movado de 1966 ĝis 1976 sennombraj mezlernejaj abiturientoj estis senditaj labori en la kamparo. Poste ili unuj post aliaj revenis en la urbojn kaj diligente lernis por akiri bonan okupon, tiel ke perdiĝis ilia plej bona geedziĝa tempo. Unuvorte, estas ankaŭ multaj aliaj kaŭzoj. La supraj estas nur la origino de tiu problemo, kiun mi traktis, por ke niaj legantoj havu klaran konon.


La geedziĝa malfacilo de relative aĝaj gejunuloj ne nur influis ilin mem, sed ankaŭ zorgigis iliajn gepatrojn, parencojn kaj kolegojn, kiuj penis forigi ilian ĉagrenon.

Ankaŭ la socio tre atentis tiun problemon. En la lastaj jaroj en multaj grandaj urboj de Ĉinio fondiĝis svatagentejoj kaj 10% de la enskribitoj geedziĝis dank' al tio. Ankaŭ iuj entuziasmuloj multe helpas relative aĝajn gejunulojn havigi al si kontentigajn amat(in)ojn. Gu Ŝuĉin, flegistino de iu hospitalo en Pekino, svatis sian nevon al preferinda knabino. Post tio, ŝiaj kolegoj kaj najbaroj petis ŝian helpon kaj ŝi ĉiufoje plenumis ilian peton. Ŝi diris: "Mi ne toleras vidi la gejunulojn ne prizorgitaj." En la pasintaj 20 jaroj ŝi starigis la aman rilaton por 1 000 paroj da gejunuloj, kaj el tiuj 150 paroj jam geedziĝis.

Kun profundigo de la kono pri la geedziĝa problemo de relative aĝaj gejunuloj, la ĉina registaro invitis en junio de la lasta jaro la Tutlandan Ĝeneralan Laboristan Sindikaton kaj la Tutlandan Virinan Federacion al diskuto pri tiu problemo, postulante, ke la diversaj organizoj atentu tiun socian problemon kaj homforte kaj

Laborantino de la Pekina Virina Federacio (la dekstra) helpas fraŭlinojn havigi al si kontentigajn amatojn.





Svatistino demandas fraŭlon pri lia kriterio por fianĉino.

finance helpu la svatagentejojn vastigi sian lokon de aktivado. Kaj la aktivuloj de tiu laboro estis laŭdataj kaj premiitaj.

De post junio de la lasta jaro la virinaj federacioj de bazaj niveloj en Pekino fondis 1 500 svatajn grupojn kun 4 000 aktivuloj kaj akceptis pli ol 4 900 relative aĝajn gejunulojn. Dank' al la svatado de la entuziasmuloj konatiĝis 2 126 paroj da gejunuloj, el kiuj parto jam fondis la aman rilaton .

Krome, en Pekino ankaŭ okazis diversaj interkonatiĝaj aktivadoj urbaj, distriktaj kaj interfabrikaj, kiuj utilis al la kontakto inter relative aĝaj gejunuloj. Estas bonvenaj baloj, projekcio de bildbendoj kaj geedziĝa konsultiĝo.

Mi vizitis centron de geedziĝa konsultiĝo, la plej grandan en Pekino, proksime de Ĝjangŭo-pordego en la orienta parto de la urbo, establitan de kelkaj oficistinoj de la Pekina Virina Federacio. Ili okazigas por gejunuloj

kursojn pri fianĉiĝa kriterio, interkonatiĝo de gejunuloj, fiziologia higieno, amo kaj estetiko ktp., kiujn relative aĝaj gejunuloj volas scii, sed pri kiuj ili ne kuraĝas demandi aliajn. Kvankam la centro estas tre simpla, tamen ĝi altiris al si ĉ. 1 000 gejunulojn.

Estas tre grave havigi al la gejunuloj la ĝustan vidpunkton pri


amo, alie helpas neniu rimedo por interkonatiĝo. En la lastaj jaroj en ĵurnaloj kaj gazetoj publikiĝis artikoloj, en kiuj iuj fakuloj traktis la ĝustan geedziĝan vidpunkton kaj iuj gejunuloj, jam irintaj zigzagan vojon, rakontis sian travivaĵon por helpi relative aĝajn gejunulojn havi ĝustan kriterion. Laŭ publika opinio, oni devas konsideri unue la moralecon kaj klarecon, anstataŭ la socian pozicion, profesion, aspekton ktp. de la amat(in)o. Iuj montris, ke romantika amo priskribita en iuj literaturaj verkoj, filmoj kaj teatraĵoj kreskiĝis ĉe gejunuloj nerealan revon. Tuj kiam ili vidas la realon, ili sentas nekomprenon, maĝojn kaj malesperon.

La prizorgo al relative aĝaj gejunuloj ne nur ebligis al ili fondi feliĉan familion, sed ankaŭ vekis la atenton de fakuloj pri sociologio, juro, etiko kaj psikologio kaj donis al ili materialon por ilia esploro pri la geedziĝa vidpunkto de la nunaj gejunuloj. Kaj la fakuloj laŭ sia faka vidpunkto publikigos artikolojn helpajn al la gejunularo.

Ĉe la rendevuejo: Jen li venas!



VOJAĜO TRA LA ANTIKVA NANĜAŬ- REGNO



La antikva kultura urbo Dali formiĝinta en la 14-a jarcento

La Junnan-a Altebenaĵo situas en la sudokcidenta parto de Ĉinio, kie la trafiko estas malfacila. Dum longaj jaroj la loko servis kiel ekzilejo de kondamnitaj en la pasintaj dinastioj de Ĉinio. Multaj el niaj legantoj eble ne konas la lokon, sed scias la elterigitajn fosiliajn dentojn de Ĵuanmoŭ-homo antaŭ ĉ. 1.7 milionoj da jaroj kaj la fosilian kranion de antikva Lama-simihomo la unuan en la mondo. En la 13-a jarcento fama veneciano Marko Polo vizitis la lokon.

En la 8-a jarcento tie aperis potenca loka reĝimo Nanĝaŭ-regno. Gvidate de reĝo Pi Lŭoge kaj subtenate de Tang-dinastio (618 — 907 p. K.), ĝi aneksis kvin malgrandajn najbarajn regnojn, tiel ke ĝia teritorio oriente tuŝis la nunan Gujĝoŭ-provincon, sude ampleksis Ŝjiŝŭangbanna,

sudoriente atingis Vjetnamion, norde etendiĝis ĝis Dadu-rivero en la nuna Siĉŭan-provinco kaj okcidente limtuŝis Birmon. Ĝi kovris areon preskaŭ egalan al tiu de la nuna Junnan-provinco.

Plejparte de la 165 jaroj, kiam la regno ekzistis, ĝi estis vasala regno de Tang-imperio. Post ĝia pereco tie aperis sinsekve kvar lokaj reĝimoj, el kiuj la lasta reĝimo Dali-regno estis pereigita de Ĵuan-imperio en 1253.

Nanĝaŭ-regno kaj Dali-regno ambaŭ kreis la brilan Erhaj-kulturon, kiel ĝin nomas la historiistoj. Antaŭ nelonge mi vojaĝis tien.

VOJAĜO TRA ERHAJ-LAGO

Erhaj-lago, ĉirkaŭ kiu troviĝis plejparto de la ĉefaj urboj de Nanĝaŭ-regno, estas pitoreska

lago sur la altebenaĵo. Ĝi, kva-zaŭ arbofolio, ondetas tuj apud Cangŝan-monto. La lago estas 1 900 metrojn alta super la mar-nivelo, ĉ. 40 kilometrojn longa kaj naŭ kilometrojn larĝa, kun

Fama stileo Dehŭa



areo de ĉ. 250 kvadrataj kilometroj. En Cangŝan-monto estas 18 riveretoj kun kaskadoj enfluantaj en Erhaj-lagon.


Sur la montoj 4 100 metrojn alta super la marnivelo troviĝas multspecaj vegetaĵoj. Tie kreskas primitivaj arbaroj, subalpaj arbaroj kaj ĉiamverdaj foliarbedaroj. Marte kaj aprile sur la vastaj montodeklivoj prosperas rododendroj. La pejzaĝo estas rava kaj alloga. Iuj specoj de la tieaj rododendroj estas raraj en la mondo.

longa je ĉ. du kilometroj, loĝas pli ol cent familioj kaj multe da fiŝkaptistoj. La reĝo de Nanĝaŭ-regno konstruigis tie por si someruman palacon, kies ruinaĵoj vidiĝas eĉ hodiaŭ. La ĉiĉerono diris al mi, ke oni estas konstruonta tie hotelon por turistoj.

Dek kilometrojn norde de la insulo kuŝas ĉarma insuleto, sur kiu staras la Templo de Avalokitesvaro.

La lago estas riĉa je karpoj, arkofiŝoj k.a.

Domoj loĝataj de baj-oj




Mi plezurŝipe vojaĝis sur la lago. Rigardate de malproksime, la arbaroj, kabanjoj, guberniurbeto kaj tri pagodoj ĉe la montpiedo de Cangŝan estis klare videblaj. Tiuj ja estas la famaj Tri Pagodoj en Ĉongŝeng-templo, el kiuj la plej granda estas Ĉjanŝjun-pagodo, kiu kun 16 etaĝoj altas 69 metrojn. La aliaj du pagodetoj sude kaj norde de la granda altas po 38 metrojn. Ili estas konstruitaj en tipa arkitektura stilo de Tang-dinastio.

Sur la lago punktiĝas fiŝboatoj plezurigaj. Sur la insulo Ĝinsŭo

RUINO DE LA URBO TAJHE

La urbo Tajhe, plivastigita en 738 p.K. estis ĉefurbo de Nanĝaŭ-regno kaj ĝia politika kaj kultura centro. Kun la tempopaso nun oni povas vidi nur ruinojn de la urbo. Norde de Ŝjagŭan, la ĉefurbo de la subprovinco Dali, je mallonga distanco troviĝas du ruinaj urbomuroj sur la deklivo de Cangŝan-monto. Ili ĉiu longas tri kilometrojn. Tie staras gorgoj kaj montpintoj. Ĝuste pro tio, ĝi estas rigardata kiel grava loko en milito. En la orienta parto de la ruino estas kiosko kun fama steleo Dehŭa ene. Ĝi, starigita en 766 p. K. estas alta 4 metrojn, larĝa 2.5 metrojn kaj dika 0.5 metron. La surskribo de la steleo detale raportis la rilaton inter Nanĝaŭ-regno kaj Tang-imperio, la produktadon kaj konstruadon en la unuaj jaroj post la fondiĝo de Nanĝaŭ-regno kaj la dislokiĝon de la nacimalplimulto. La surskribo atestas, ke Nanĝaŭ-regno estis loka reĝimo partoprenata de estroj de ĉiuj triboj kun Umantribo kiel la ĉefo. Uman-tribanoj estas la prapatroj de Ji-nacieco de Ĉinio.

La nova aŭtostacio ĉe Ŝjangŭan de Dali, kiu estis ĉefa pasejo al Birmo kaj Hindio en la Okcidenta Handinastio



ARKITEKTURO DE BAJ-NACIECO

Veturinte de la ruino Tajhe-urbo ĉ. 10 kilometrojn norden laŭ la Junnan-Tibeta Ŝoseo, oni povas vidi antikvan urboturon, sur kiu estas inkrustitaj la ideografiaĵoj Dali. Tio estas urbo konstruita en la 14-a jarcento. En la urbo oni sentas sin kvazaŭ en bela galerio. La stratoj de la urbo estas pavimitaj per longaj

ŝtonpecoj kaj ombrataj de antikvaj arboj. Ambaŭflanke de la stratoj troviĝas butikoj, kie vendiĝas diversaj metiartaĵoj el marmoro propra al Cangŝan-monto, kiaj ekranetoj, tuĉ-frotaj platoj, florzavoj kaj aliaj. La marmoro de Cangŝan-monto havas naturajn vejnojn similajn al nuboj, montoj, riveroj kaj bestoj.

Dali estas loko koncentre loĝata de baj-oj. La viroj ŝatas porti

blankan jakon kun nigra veŝto ekstere. La virinoj, kun hartubero sur la kapo, portas blankan dekstre butonumitan jakon kun nigra, blua aŭ ruĝa veŝto ekstere. La fraŭlinoj ŝatas plekti siajn harojn en unu harligon kaj volvas ruĝan ŝnuron sur blanka kaptuko. Ili ĉirkaŭas sian talion per mallonga, brodita tuko.

Iliaj domoj estas el ŝtonoj kaj lignoj, kun aparta originaleco. La tegmentrandaj fendoj de domo estas kovritaj per grizbluaj ardezoj. La sulkoj de la tegmento estas aranĝitaj per plataj tegoloj kaj ĝia supro per tubotegoloj. La muroj estas kalkitaj. La tegmento de portalo konsistas el tegoloj, metitaj unu sur alia, kun supren leviĝantaj randoj. Krome, la konstruaĵo ornamita per skulptaĵoj el argilo kaj ligno, koloraj pentraĵoj, ŝtonaj gravuraĵoj, marmoraj ekranoj kaj brikaĵoj reliefoj. Ĉiuj pecoj de la tuta konstruaĵo estas juntitaj kompakte, per nenia fera najlo. Ĝi ne transformiĝis eĉ post multaj jaroj. En Ŝjiĝou norde de Dali mi vizitis du loĝejojn, kies pordoj kaj fenestroj estis ornamitaj per gravuraĵoj kaj reliefoj. Sur la protektaj platoj de la mezaj ĉambroj estas gravuritaj pino kaj gruo, ardeo kaj lotuso, pavo kaj magnolio, ora koko kaj umefloro, koko kaj peonio.


Iliaj domoj ĝenerale estas duetaĝaj. Iuj loĝejoj havas kvadratan formon kun 5-parta korto. Aliaj kun ekranmuro interne de la enirejo havas domojn ĉe la aliaj tri flankoj. La konstruaĵoj racie projektitaj oportunas por loĝado. En Junnan-provinco la vetero ĉiam estas agrabla kiel printempo. La loĝantoj ŝatas planti diversajn florojn en siaj kortoj, kiaj kamelioj, rododendroj, ĉinaj rozoj ktp., kiuj floras kaj bonodoras tutjare.

Fiŝistoj loĝantaj ĉe la bordo de Erhaj-lago preparas sin por fiŝado.



Baj-oj sunumas kapsikojn.





Metiartaĵoj faritaj el marmoroj de Cangŝan-monto

PAPILIA FONTO

Sub Junnong-montpinto de Cangŝan troviĝas klara fonto, el

kies fundo malrapide ŝprucas alten per laj veziketoj. La fonto estas ĉirkaŭata per marmora balustrado. Sur la montodeklivo

ĜOU ĜENGLING:

KVIETA RIVERO

(MIKRONOVELO)

Mi ne povis kompreni, kial mia patro kun tiom granda fervoro partoprenas ĉu en nia naĝado, ĉu en nia promenado. Ĉu ankoraŭ ne estas sufiĉe evidenta nia malkontento pri tio? La junuloj devas havi sian propran vivon kaj sian propran societon. Kiam mi maljuniĝos, mi certe ne ĝenos junulojn tuttage kaj mi volas fariĝi maljunulino prudenta. Ĉe tia penso, mi kredas, ke ironia rideto neeviteble ludas sur mia vizaĝo.

“Iru naĝi!” Je ekkrio, mi, mia frato kaj lia fianĉino, kiuj lernas en universitato kaj pasigas somerajn feriojn hejme, plej rapide preparis al si la necesaĵojn por naĝado kaj eliris el la domo.

Ŝajne, neniuj aŭdis la maltrankvilan voĉon de la patro: “Atendu min!” Hieraŭ, ĝuste en tia hasteco la patro ne trovis sian bankalsoneton. “Ĉu vi bonvolus atendi min?!” la patro kuratingis nin.

Iris kune ni kvar: tri junuloj kaj unu maljunulo. La patro kun granda intereso parolis dum la tuta vojo; mi rigardis lin kun miro, kial lia intereso estas tiel malfacile detruenda.

Jen ni atingis la lokon. La rivero estas larĝa, ne tre bela, nek animskua. Ĝi kviete kuŝas inter la kampoj. Aŭ ĝi senbrue rakontas pri la pasintaĵoj, aŭ ĝi absorbite atendas novajn rakontojn. Mi surmetis naĝveston,

kreskas akacioj, koptisoj kaj aliaj aromaj arboj. La akacio donas bonodoran kaj dolĉan sukcon, kiu allogas al si sennombrajn papiliojn. En la unuaj tagoj de aprilo papilioj flugas tien kaj, kroĉante unu alian, inverse pendas sur la arboj kun branĉoj kliniĝantaj ĝis la fontosurfaco. El ili iuj estas grandaj kiel manplato, aliaj malgrandaj kiel abelo, ĉiu kun buntaj koloroj. La spektaklo atingas sian kulminon en la 15-a de aprilo. Baj-oj nomas la tagon festo de papilia kunveno kaj la fonton la Papilia Fonto. En la tago la loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo kolektiĝas kaj amuziĝas. Nun la loko fariĝis kiel parko. Kiam mi estis tie, ankoraŭ ne venis la festo sed ne mankis vizitantoj.

saltis en la akvon kaj ekaĝis al la transa bordo.

“Atendu min,” denove eksonis la voĉo de la patro. Nature, la bordo estis libera loko de mia frato kaj lia fianĉino, kaj la patro devis resti kune kun mi. Mi lante naĝis karesate de la akvo. En malvarmeto kaj ĝoja animstato, mi ekpensis pri mia alia frato. Li ne ŝatas naĝi, sed ludi piedpilkon sub la arda suno en someraj tagoj. Sed la patro ekŝatis naĝadon post emeritiĝo. Kian intereson donas al li naĝi kune kun sia filino malkontenta pri li!

Mi atingis la transan bordon, kaj la akvo senorde fluis malsupren de sur mia korpo. Mi levis

la rigardon por kapti la figuron de la patro sur la rivero. “Ve, kien malaperis la patro?” Mi traserĉis la akvosurfacon en maltrankvilo. Mi kredis, ke en la daŭro de tiu tempeto la patro ne povas naĝi eksteren de mia vidkampo. Malvarmega fluo ŝajne enpikis mian korpon tra la piedplandoj kaj mankavoj, kaj la koro forte batis tuj, kvazaŭ la maltrankvilo puŝis ĝin al la gorĝo. Mi vidis la fraton kaj lian fianĉinon sur la transa bordo kaj haste demandis: “Fraĉjo, kie estas la patro?” La fraĉjo senparole skuis la kapon foje refoje kaj poste li naĝis laŭ la fluo por serĉi la patron. Sur la vasta rivero estas nenio, kio povas bari al ni la rigardon. La rivero sen branĉoj fluas rekte antaŭen, ke la rigardo povas etendiĝi tre malproksimen. La kvieta akvosurfaco kvazaŭ strikta kanvaso kovras ĉion kiel kutime.

“Atendu min,” la voĉo de la patro antaŭe estis tiom abomeninda por mi, sed nun mi forte deziris denove ĝin aŭdi. Ĵus mi rifuzis al la patro, kaj la rifuzo estis tiel senpripensa. Nun la plej granda feliĉo en la mondo por mi estas resti kun la patro kaj strikte sekvi lin per la rigardo en la naĝado por vidi lin trankvile naĝi. Ĉu mi povus reakirti tian feliĉon?

“Paĉjo, paĉjo!” Mian senĉesan kriadon akompanis larmoj de pento. Mi jam tute komprenis la ofendiĝon kaj malesperon de la patro: antaŭe li estis tiel majesta kaj severa, sed nun li fariĝis tre humila por havigi al si ŝancon resti kune kun siaj infanoj, sed tamen la lastaj tute ne volis tion. “Paĉjo, paĉjo!” nun mi pentis esperante indulgon, sed ĉu tion mi faris ne jam tro malfrue? En mia cerbo kirliĝis flugrapide tiaj kaj aliaj malespe-

raj konjektoj. “Paĉjo, paĉjo!” La rivero eĥis mian teruran kaj malesperan kriadon.

“Aĥ, li estas tie!” subite ekkriis la fraĉjo sur la transa bordo montrante al la supra fluo de la rivero. “Kie?” mi ĉirkaŭrigardis kaj ne trovis la figuron. “Jen tie.” “Vere?” mi ne sciis, ĉu mi kredis al lia vorto aŭ al miaj okuloj. “Plaŭdo,” mi ĵetis min en la akvon kaj rapide naĝis al la transa bordo.


Mi surbordiĝis en spirego. Vidante la patron staranta antaŭ mi, mi demandis en kolero: “Kien vi naĝis?” “Min preterpasis motorŝipo, kaj mi ascendis ĝin.” “Kial vi ne sciigis min?” “Neniu el vi volas naĝi kune kun mi, tial mi surgrimpis la ŝipon, resti sur la ŝipo estas tre interese.” La patro embarasite kla-

rigis kvazaŭ kulpiĝinta infano, eble pro tio ke li rimarkis lar-mojn en miaj okuloj. Mi turnis min al la fraĉjo: “Kion vi faris? Vi eĉ ne sciis, kien paĉjo iris?!” Subite mi ĉesis kun la riproĉo, trovinte ke la paĉjo rigardas min per la okuloj plenaj de dankemo kaj kareso. Mi eksentis malĝojon, kvazaŭ vidante ke la paĉjo sidas inter gajaj infanoj.

Eble stulta hipokriteco tiamaniere degenerigas homojn. Kial mi ne diris: “Paĉjo, mi eraris. Mi ne devis forlasi vin kaj naĝi sola.” Kiom da pento kaj bedaŭro la homoj travivos! — Sed kiam la homoj povos kuraĝi ĝuste taksu sin?

Sur la revenvojo, rigardante la ĝibetan figuron de la paĉjo, mi neniel povis kvietigi mian koron.

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)



Centpaŝa Ekzercado

La ekzercado estas farata ĉefe por movi la malsupran parton de la korpo kaj plifortigi ĝian funkcion. Ĝi estas preskaŭ sama kiel piedirado. Por malsamaj praktikantoj estas du manieroj de ekzercado: La dua maniero estas iom pli malfacila ol la unua, nur relative. Fakte, ĝi estas multe pli facila ol la ordinaraj sportoj.

Vi povas ekzerci vin paŝante malrapide en vasta loko eksterdome, sed en ĉambro vi povas alterne levi kaj mallevi la piedojn ĉeloke.

Antaŭ ol fari la ekzercadon, liberiĝu de ĉiaj pensoj, nenion aŭskultu nek rigardu flanken, sed malstreĉu vian korpon, tenu vin en bona humoro kaj evitu rapidajn movojn. Post cent paŝoj, se necese, faru pliajn centojn da paŝoj laŭ via eblo.

LA UNUA MANIERO

A. PIEDIRI KUN LEVITAJ BRAKOJ

1. Staru kun brakoj mallevitaj, kaj la distanco inter la piedoj

estu tiom granda kiom inter la ŝultroj (Bildo 1).

2. Leku la palaton, rigardu antaŭen kaj spiru per la nazo (kun natura ventromoviĝo).

3. Kunmetu la fingrojn kaj malrapide levu la brakojn de malsupre antaŭen-supren en formo de arko ĝis antaŭ la nazo kaj buŝo; samtempe kun tio, levu la maldekstran femuron malrapide ĝis horizontaliĝo kaj tenu la kruon kaj piedpinton malsupren (Bildo 2).

4. Tuj poste, mallevu la manojn malsupren, kvazaŭ karesante la barbon, de antaŭ la brusto ĝis la subventro, direktu ilin ambaŭflanken kaj metu ilin en la antaŭan lokon; samtempe kun tio, milde mallevu la horizontalan femuron. Tio estas unu paŝo (indikaj signoj en bildo 2).

5. Poste, laŭ la supre dirita maniero levu malrapide la brakojn kaj mallevu ilin malsupren; samtempe kun tio, horizontaligu la alian femuron kaj mallevu ĝin; tiel farante iru 20-kelkajn paŝojn,

retiru la langon kaj englutu la salivon. Faru la sekvan movon sen aŭ tuj post iom da ripozo.

B. PIEDIRI KUN LEVITA DEKSTRA BRAKO


1. Leku la palaton kaj apogu la maldekstran manon sur la talio, kun dikfingro direktita malantaŭen kaj la aliaj fingroj antaŭen (Bildo 3).

2. Levu la dekstran manon de malsupre antaŭen-supren en formo de arko ĝis antaŭ la nazo kaj buŝo; samtempe kun tio, malrapide horizontaligu la dekstran aŭ maldekstran femuron (Bildo 4).

3. Tuj poste, mallevu la dekstran manon, kvazaŭ karesante la barbon, de antaŭ la brusto ĝis la subventro, direktu ĝin dekstren kaj metu ĝin en la antaŭan lokon; samtempe kun tio, milde mallevu la horizontalan femuron. Tio estas unu paŝo (Indikaj signoj en bildo 4). Poste, piediru per la alia gambo kaj levu la alian brakon kiel supre dirite. Tiamaniere faru 20-kelkajn paŝojn, alternigante la dekstran kaj maldekstran gambojn. Retiru la langon kaj englutu la salivon. Faru la sekvan movon sen aŭ tuj post iom da ripozo.

C. PIEDIRI KUN LEVITA MALDEKSTRA BRAKO

Poste apogu la dekstran manon sur la talio, levu kaj mallevu la maldekstran manon malrapide kiel supre dirite, samtempe alterne horizontaligu la dekstran aŭ maldekstran femuron kaj poste mallevu ĝin; tiamaniere faru 20-



kelkajn paŝojn, retiru la langon kaj englutu la salivon. Faru la sekvan movon sen aŭ tuj post iom da ripozo.

Ĉ. PIEDIRI KUN ALTERN- NE LEVITAJ BRAKOJ

Levu kaj mallevu la maldekstran brakon malrapide kiel supre dirite, samtempe horizontaligu la dekstran femuron kaj mallevu ĝin; tuj poste, levu kaj mallevu la dekstran brakon kaj horizontaligu la maldekstran femuron kaj mallevu ĝin. Tiamaniere faru 20-kelkajn paŝojn alterne levante la brakojn, retiru la langon kaj englutu la salivon.

LA DUA MANIERO

La movoj estas samaj kiel tiuj de la unua maniero, nur kun jena aldono.

1. Kiam unu gambo estas levota aŭ levita, la alia devas ĉiam esti iom fleksita. Sed la unua maniero permesas ĉiam stari rekte.

2. Tenu malsupren la ŝultrojn, kubutojn, klaviklojn kaj ankaŭ la ripojn. Tenu la bruston iom internen (ne tro). Iom streĉu kaj supren levu la dorson kaj neniam kurbigu ĝin kaj kuntiru la ŝultrojn kaj kubutojn.

3. Malstreĉu la talion kaj koksojn kaj tenu la kokcigon internen ŝajne por apogi la subventron. La celo de tio estas teni la kapon kaj la supran korpon sur rekta linio kaj ne kurbigi la talion nek elstarigi la koksojn.



Ĉinaj Popolaj Rakontoj Papilia Fonto

Popolrakontoj de nacimalplimultoj Bajoroj, Ujguroj, Tajoj, kaj Ĝuangoj, inkluzive de "Papilia Fonto", "Saĝa Virino", "La Fratoj Dogada", "Bela Ĝuang-a Brokato" kaj "Legendo pri Abel".

Formato: 110 × 180mm. 68pĝ.

Prezo: £0,50 US\$0,95

Numero: 10-Es-1883P

Magia Ŝipo

Popolrakontoj de Han-nacieco, inkluzive de "Magia Ŝipo", "Lu Ban Lernis Ĉarpentadon", "Pontoj en Gaŭgoŭ", "Ruĝa Fonto", "Karpoknabino" kaj "Magia Perlo".

Formato: 110 × 180mm. 76pĝ.

Prezo: £0,50 US\$0,95

Numero: 10-Es-1623PA

ELDONITAJ DE LA ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

**REFORMO AL LA EKONOMIA
SISTEMO — LA PLEJ
GRAVA AFERO EN ĈINIO**

En la interparolo kun la delegacio de la Partio de la Alĝeria Naci-liberiga Fronto la gvidanto de Ĉinio Deng Ŝjaŭping montris, ke fari ampleksan reformon al la ekonomia sistemo de Ĉinio estas la plej grava kaj ankaŭ la plej peniga tasko de Ĉinio. Li diris, ke en la ekonomia reformo, se oni agos vere konforme al la ekonomia leĝo, Ĉinio povos ordigi diversajn interrilatojn en la venontaj du-tri jaroj, sekve tio metos bazon por stabila, daŭra kaj harmonia disvolvigo en la venontaj kvindek-sepdek jaroj.

**FINKONSTRUIĜO DE LA
ŜTALEJO DE LA ŜANHAJA
BAŬSAN-A FERA-ŜTALA
KOMPANIO**

En la 24-a de junio finkonstrui-

ĝis la Ŝtalejo de la Ŝanhaja Baŭsan-a Fera-ŝtala Kompanio, kiu aplikas la plej avangardan teknologion kaj plej bonajn ekipaĵojn kontraŭ media polucio en la nuna Ĉinio.

La ŝtalejo estas unu el la ĉefaj konstruaĵoj de la unuaperioda konstruado de la kompanio. En la ĉefa konstruaĵo de la fabriko estas tri 300-tunaj supre-blovaj oksigenaj konvertoroj kiuj povas produkti ĉiujare 6.5 milionojn da tunoj da ŝtalo. La rendimento de la ŝtalejo estas dek kvin-oble pli alta ol la meznombra rendimento de la nunaj ŝtalaj fabrikoj de Ĉinio.

La ŝtalejo estis ekipita per tri kompletoj da ekipaĵoj por traktado de eluzita gaso, kiuj garantias, ke ĉiu kubmetro da gaso entenas malpli ol 0.1 gramon da poluciaĵo, kio estas multe malpli alta ol la permesata normo de la ŝtato. Tiuj ekipaĵoj reakiras en ĉiuj ok horoj varmon kaj brulgason ekvivalen-

tajn al 30 tunoj da bonkvalita karbo.


**NOVA NIVelo DE TEKNIKO
DE GRANDA KAJ
MEZGRANDA KOMPUTEROJ
DE ĈINIO**

La unua ĉina mezgranda universala komputera sistemo de tipo 8030 sukcese trapasis la ŝtatan ekspertizadon en la 23-a de junio. La kvalito de tiu ĉi sistemo atingis la nivelon de la samtipaj fremdlandaj produktaĵoj de la mezaj sepdekaj jaroj. Fakuloj opiniis, ke tio markas la novan nivelon de la tekniko de granda kaj mezgranda komputeroj de Ĉinio.

En la farado de la komputero, la Orient-Ĉinia Komputerteknika Instituto aplikis la metodon kombini memprojektadon kun teknika importado. Kaj, adapte al la realo de Ĉinio, ĝi sukcese uzis siajn novajn teknikojn kaj faris novan rompon en teknologio.



Deng Ŝjaŭping manpremas kun delegito de la partio de la Alĝeria Naci-liberiga Fronto.



Stalejo de la Ŝanhaja Baŭŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio

22 SPECJOJ DE MANĜAĜOJ DE ĈINIO ORMEDALE PREMIITAJ INTERNACIE

22 specoj de manĝaĝoj de Ĉinio estis ormedale premiitaj de la Internacia Gastronomio kaj Turisma Komitato. La premiitaj manĝaĝoj estas Maŭtaj-vino, riza vino de Ŝaŭŝing, aroma vinagro de Ĝenĝjang, jasmena teo, ladlongano, ladliĉio, ladakvokaŝtano k.a. La premia ceremonio okazis en Parizo, junion.

ĈINA ALTKLASA KONSILANTO EN INSTITUCIO DE UN

Antaŭ nelonge dezertologino kaj vicprezidantino de Gansu-provinco Liŭ Ŝu estis invitita de la Media Programo de UN kiel altklasa konsilanto de la Tria Konsilio por Dezertologio. Ŝi estas la unua altklasa specialistino invitita de tiu institucio.

DUDEK-JARA VIVADO POST OPERACIO DE ŜANĜO DE KARDIOVALVO

La 12-a de junio estas la dude-

ka datreveno de operacio al tekstistino Ŝju Ŝubaŭ. Antaŭ dudek jaroj ĉinaj ĥirurgoj unufoje ŝanĝis al ŝi la kardiovalvon arte faritan de Ĉinio mem. Antaŭ nelonge kuracistoj faris al ŝi ampleksan ekzamenon kaj konstatis, ke ŝia koro funkcias bone. La kardiovalvo kun grandeco de duona dikfingro fidele laboris 7 300 tagojn bonorde.

Koncernaj materialoj montras, ke ŝi estas la plej longtempa vivanto en la mondo kiu akceptis arte faritan kardiovalvon.

UNUA ĈINA NACIMALPLIMULTA MUZEO ESTABLITA EN ŜJICANG

En la urbo Ŝjicang en la montaro Ljangŝan de Siĉŭan-provinco establiĝis Muzeo de Ji-nacia Sklava Socio de Ljangŝan kaj estis malfermita al la publiko en la unua deko de aŭgusto. Ĝi estas la unua nacimalplimulta muzeo de Ĉinio. La muzeo 4 000-kvadratmetra kun 7 ekspozicijaj haloj situas sur la pitoreska Luŝan-monto. La

ĉ. 2 000 objektoj eksponataj prezentas la historian evoluadon de la Ji-nacia popolo de Ljangŝan-montaro, de la sklava socio en la socialisman.

MONDA REKORDO DUFOJE KREITA EN UNU TAGO

La 7-an de junio, en la urbo Ŝaŝi de Hubej-provinco la Pekina Paraŝutista Trupo konsistanta el Ŭang Jongli, Ĉen Li, Ĝang Ling kaj Han Jiĉjang faris 23 plastikojn en kvar minutoj kaj dufoje rompis la rekordon de 22 plastikoj en kvar minutoj, kiun ili kreis en 1983.

NOVA AZIA REKORDO DE VIRINA ĴETLANCADO

En junio de 1985, en la finalo de virina ĵetlancado de la Tutlanda Ĉampioneca Atletika Konkurso de 1985 okazinta en la stadiono Hongkoŭ de Ŝanhajo, 21-jara sportistino Ĉu Hongjang de Ŝanhajo rompis per 63.08 metroj la azian rekordon de 61.64 metroj

kreitan de la ĉina sportistino Tang Gūoli.

REVIVIGO DE VIDINDEJO EN LA RUINO DE LA IMPERIESTRA ĜARDENO JUANMINGJUAN

La lago Fuhaj kun areo de 280 000 kvadratmetroj en la ruina mondfama ĝardeno Juanmingjūan en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino estis dragita, ordigita kaj malfermita al la publiko en la 29-a de junio.

Tio estas la unuafoja grandskala riparado de post kiam la imperiismaj potencoj prirabis kaj bruldezertigis la ĝardenon en 1860.

La meza profundo de la lago estas 1.5 metroj. En la lago oni bredas 150 000 fiŝojn. Sur la lago estas 200 kanotoj. Oni riparis 2 500 metrojn da bordo. Cetere oni konstruis pontojn, kluzojn kaj kulvertojn kaj plantis pli ol 3 000 arbojn.

La lago estas nur malgranda parto de la ruina ĝardeno. La ceteraj vidindejoj ekzemple insuloj en la lago kaj aliaj ruinaj konstruaĵoj estas riparataj.

PREMIERO DE "KANTO DE LA TERO" DE MAHLER EN ĈINIO

Antaŭ pli ol 70 jaroj, influate de la imponaj poemoj de la ĉinaj grandaj poetoj Li Baj k.a. de Tang-dinastio en la oka jarcento, la granda aŭstra komponisto Mahler verkis senmortan voĉmuzikan simfonion en cirkla formo "Kanto de la Tero". La verko,

premiere prezentita en Munkeno en 1911, grave influis la evoluon de simfonioj en la postaj jaroj.

Komence de julio, aŭstralia direktisto s-ro Leonard Dommett venis al Ĉinio kaj surscenigis la komponaĵon kune kun la orkestro kaj la aktoroj de la Ĉina Centra

Opero. Krom tio s-ro Dommett mem ludis violonon kaj samtempe direktis la ĉinan violonan koncerton "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj".

TURNEO DE LA TAJLANDA ENSEMBLO EN ĈINIO

Por celebri la dekan datrevenon de la stariĝo de la diplomaciaj interrilatoj inter Ĉinio kaj Tajlando, 30-persona ensemblo de Tajlando faris turneon en Ĉinio, de la 27-a de junio ĝis la 9-a de julio.

La ensemblo jam kvarfoje vizitis Ĉinion. Ĉifoje, krom la popularaj kaj klasikaj dancoj de Tajlando, la ensemblo speciale prezentis la dancon "Ĉina-Tajlanda Amikeco".

ABONTARIFO DE EPC

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)


Lando	Valuto	1 jaroj	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00




S-ro Leonard Dommett en direktado


KARIKATURO




Birdo kaj homo
de ĜUANG MINGIN



Patro kaj la filo
de LIŬ ĈINGJUI



Aera atako
de ŬANG JI




Transplantado de floro
de ĜJA ĜAUZENG



Forpelado de birdoj



Kun kreskado de aĝo
de ĜENG ŜINJAU



Kunlaboro
de ŬANG ZUHE

Ĝenroj de la Lisu-a na-
cieco en okcidenta Junnan

de LIŬ JŬEHUJ



Trikorda instrumento kaj arbofo-
lioĵ—esprimiloj de la amo inter
gejunuloj



Fraŭlo ĵetas tabaksakon al fraŭlino
por esprimi sian amon al ŝi, sed
ŝi levas la sakon, tio signiĝas ŝian
konsenton.



En la geedziĝa tago la novedzo
renkontas la novedzinon kun riz-
vino en la manoj.



En la geedziĝa tago la bopatrino
metas koloran rubandon ĉirkaŭ la
kolon de la bofilo.

BUNTAJ LITERATURO KAJ ARTO

de SUN MINGĜEN

Oni honoras Tibeton per maro de kanto kaj danco. La tibeta popolo vivanta sur la neĝkovrita altebenaĵo estas serena kaj entuziasma. Ĉu sur kampo kaj poŝtejo, ĉu en konstruejo la laboro estas ĉiam akompanata de kanto. Post laboro ili dancas de ĝojo. En la festoj kaj ferioj viroj, virinoj, geknaboj kaj maljunuloj en buntaj tibetanaĵoj torentas al parkoj aŭ kolektiĝas ĉe proksimaj ebenaj lokoj por sate sin amuzi tie. Ili jen trinkas hordean vinon, jen kantas kaj dancas, kaj hejmen revenas vespere. La paŝtistoj sur stepo ofte okazigas kampofajran vesperon kun apartaj trajtoj, en kiu dekoj kaj centoj da homoj ĝoje kantas kaj dancas ĉirkaŭ la kampofajro ĝis mateniĝo.

Varma amo de la popolo al arto prezentis vastan kampon por disvolvi la tibetajn literaturon kaj arton.

La tibetaj literaturo kaj arto estas riĉaj kaj multspecaj kun okulfrapa nacieca karaktero kaj longa historio. Ili estas bela floro en la ĉina literatura kaj arta ĝardeno. La tibetaj tradiciaj kulturo kaj arto konsistas ĉefe el folkloro, popolkantoj, dancoj, kant-rakonta literaturo, tibeta teatro, gravurarto, skulpturo, pentrarto kaj aliaj.

La folkloro kun longa historio vaste cirkulas en Tibeto. Ĝi estis tradicia jam en la sepa jarcento antaŭ la naskiĝo de la tibeta

skriba lingvo. Poste, oni notis ĝin kaj faris al ĝi artan prilaboron, tiel ke aperis skribaj rakontoj. Inter ili estas famaj la "Neelĉerpeblaj Rakontoj", "Rakontoj pri Agudunba", kaj la rakontaj kolektoj por komentarii maksimumojn "Klarigoj de Sagmaksimumoj" kaj "Klarigoj de Gedanmaksimumoj".

Multaj tibetanoj povas improvizi kantojn antaŭ belaj pejzaĝoj, tial naskiĝis maro da tibetaj popolkantoj. Laŭ historiaj notoj, antikvaj tibetanoj ŝatis interŝanĝi la penson per ritmaj vortoj, kaj aperis multaj popolkantoj vaste cirkulantaj. Post apero de skriba lingvo la popolkantoj kaj poemoj atingis novan nivelon. Estas diversaj specoj de tibetaj popolkantoj, kiaj popolkanto, pastoralo, laborkanto, himno, sagpafa kanto, drinkkanto, odo, amkanto kaj aliaj. En la fino de la 17-a jarcento, la amkantoj verkitaj de Dalaj lamao la Sesa Cangjang Ĝjacŭo (nun ekzistas 64 kantoj)

estas ĉefverko de la tibetaj popolkantoj, vaste cirkulanta kaj profunde influhava. La kanto kaj danco de tibetanoj preskaŭ ĉiam akompanas unu la alian. La tibeta danco povas esti farata kaj arope kaj unuope, kun fortaj kaj belaj ritmoj.

La kant-rakonta literaturo ĝuas altan reputacion inter la tibetaj popolanoj. Tie vaste cirkulas "Ĝega", kiun oni kantas kaj rakontas antaŭ tola bildo kaj kant-rakonto de "Reĝo Gesal". Tiu lasta estas granda tradicia literatura verko en Tibeto en multaj jarcentoj. Ĝi rakontas pri la antikva heroo, kiu subigis demonojn kaj malvirtulojn kaj havigis al la popolo pacan vivon. Dank' al senĉesa polurado kaj enhavoriĝo de popolaj artistoj, ĝi fariĝis granda verko en pli ol 30 volumoj kun 15 milionoj da vortoj. Tiu epopeo de la tibeta popolo ĉiam perle brilas en la trezorejo de literaturo kaj arto de la ĉina nacio.

Kanto kaj danco sur stepo

de CAJLONG





Fama tibeta direktisto Egdue

La tibeta teatro multe ŝatata de la tieaj loĝantoj estas originala specio el la diversaj teatroj en Ĉinio. Ĝi estas ankaŭ sinteza arto de muziko, kanto, danco kaj aliaj. Laŭdire, ĝi estis kreita de tibeta artisto Tangdongjebu, kiu kolektis monon por konstrui ponton. Ĝi aperis antaŭ pli ol 500 jaroj. Dank' al senĉesa enhavoriĉigo de diverstempaj artistoj, ĝi jam havas nombron da eminentaj tradiciaj teatraĵoj en certa prezenta formo. Dum prezentado la aktoroj plejparte portas maskon. Kiam unu kantas, la aliaj lin akompanas. La kantado estas laŭta kaj forta kun voĉa melodio longe tirata. Ĝenerale, estas nur unu tamburo kaj unu cimbalo, unu persono klarigas la enhavon apude.



Veterana brodisto en instruado

de LING FENG

Gravurarto, skulpturo kaj pentrarto okupas okulfrapan pozicion en diversaj artoj de Tibeto. En Tibeto oni kredas je lamaismo kaj ĉie vidiĝas temploj kun miloj da budhaj statuoj kaj belkoloraj freskoj. La tieaj gravurarto, skulpturo kaj pentrarto disvolviĝis samtempe kun konstruado de temploj. En Tibeto oni povas ĝui argilajn kaj latunajn skulptaĵojn, lignajn kaj ŝtonajn gravuraĵojn kaj precipe la buterajn gravuraĵojn kaj skulptaĵojn kun originaleco. Plejparto de ili estas budhaj statuoj kaj la ceteraj — statuoj de historiaj personoj, animaloj, floroj kaj herboj. La sen nombraj freskoj kaj tolaj aŭ silkaĵaj pentraĵ-ruloj konservataj en la temploj estas trezoroj postlasitaj de diverstempaj tibetaj artistoj. Krom budhaj portretoj, ili enhavas ankaŭ mitojn, legendojn, historiajn rakontojn kaj personojn, socian vivon, pejzaĝojn ktp. La uzitaj farboj plejparte estis mineralaj, kolorfreŝaj kaj ne-senkoloriĝaj eĉ post centoj da jaroj. La freskoj kaj pentraĵ-ruloj estas altnivelaj kaj admirindaj.

En la pasintaj pli ol mil jaroj la tibeta popolo kreis brilan kulturon kontribuante al la disvolvigo de la ĉina nacio. Sed antaŭ la paca liberiĝo de Tibeto en 1951, la literaturo kaj arto estis monopoligitaj ĉefe de monaĥoj kaj aristokratoj, dum la kultura vivo de la ordinara laboruloj estis tre malriĉa. Tiam la artistoj

estis rigardataj kiel malsuperuloj vivantaj en la socia fundo. La paca liberiĝo en 1951 kaj la demokratia reformo en 1959 malfermis novan paĝon de la tibeta historio kaj ankaŭ pavimis larĝan vojon por la disvolvigo de la tibetaj literaturo kaj arto.

Nun en Tibeto estas 3 000 kulturaj kaj artaj laborantoj, inter ili 70% estas tibetanoj, inkluzive de verkistoj, poetoj, dramistoj, muzikistoj, kantistoj, dancistoj, fotistoj, belartistoj k. a. La Literatura kaj Arta Federacio de la Tibeta Aŭtonoma Regiono (ULAR TAR) oficiale fondiĝis en oktobro de 1981, ĝi havas ok filiojn kaj 360 membrojn. Faraŭte kreadon kaj prezentadon, ili eldonas la periodaĵojn "Tibeta Literaturo" kaj "Tibeta Kanto kaj Danco" en la lingvoj tibeta kaj hana. Dank' al tio la tibeta popolo unufoje eklegis lokajn literaturajn kaj artajn gazetojn. En Tibeto nun aktivadas dek profesiaj artaj trupoj de la regiono, urboj kaj subregionoj, kiaj tiuj de kanto-danco, tibeta teatro kaj moderna dramo, unu mezgra-

Kantistino Caidangyüoma

de LI ĜJILU





Sceno el la "Vivo de Ĵaba-oj"
de ĈENG ŜJI

da arta lernejo speciale por kulturi literaturistojn kaj artistojn kaj 620 filmprojekciaj trupoj. En Tibeto nun laboras granda nombro da kinejoj, teatroj, artaj domoj, kulturaj domoj kaj bibliotekoj.

En Tibeto estas pli ol 400 profesiaj kaj amatoraj verkistoj, kiuj publikigis ĉ. 600 diversstilajn literaturajn verkojn en la lingvoj tibeta kaj hana en 1982 kaj 1983. Krome, oni filmis du televidajn filmojn pri la tibetana moderna vivo. Ankaŭ la filma dublado en la tibeta lingvo akiris grandan sukceson. Sole en 1984 oni dublis 25 filmojn, kio estis varme bonvenigata de la tibetanoj. La tibetaj kamparanoj kaj paŝtistoj povas senpage rigardi filmon dufoje ĉiumonate.

De la lastaj jaroj la tibetaj literaturistaj kaj artistaj rondoj donas grandan atenton al heredo kaj disvolvo de sia tradicia nacia kulturo. La aŭtonoma regiono


speciale fondis gvidan grupon por kolekti kaj kompili la "Reĝo Gesal". Oni jam surbendigis por kantisto-rakontistoj 7 milionojn da vortoj kaj eldonis dek volumojn. Post nelonge tiu ĉi plej longa epopeo en la mondo aperos komplete en libra formo. La "Kolekto de Popolkantoj — tibeta parto" en dek volumoj estis jam finkompilita, la freskoj kaj tolaj aŭ silkaĵaj rul-pentraĵoj estis eldonitaj en kvar volumoj. Parto de popolaj dancoj estis vidoregistrata post reordigo. Nun la "Ĉina Teatra Kolekto — tibeta parto" estas en kompilado.

La verkado kaj prezentado de la tibetaj artaj trupoj estas senprecedence viglaj. Surbaze de kolektado kaj prifosado de tradiciaj popolaj kantoj kaj dancoj, la Tibeta Kanto-Danca Trupo faris kuraĝan esploradon kaj verkis en 1983 la unuan grandan baleton de Tibeto "Vivo de Ĵaba-oj". Ĵaba-oj estis vagabondo-artistoj, kiuj aktivadis en orienta Tibeto antaŭ la Liberiĝo kaj vivtenis sin per akrobataĵoj. Ili, altnivelaj en arto, tamen vivis en la socia fundo. Ili vagis ĉie kiel ciganoj. La baletto reaperigis, per la amotragedio de vagabondo-artisto Ĝanduj kaj servutula filino Ĝuoga, la fizionomion de la tibeta socio antaŭ la Liberiĝo kaj prikantis la amon de la tibeta popolo al la vivo kaj ĝian strebadon al la libereco.

Rejuniĝis nun ankaŭ la antikva tibeta teatro. Krom la supre diritaj artaj trupoj, aperis ankaŭ granda nombro da amatoraj tibet-teatraj trupoj. Ili ofte prezentas tradiciajn teatraĵojn kaj faras provon en prezentado de modernaj dramoj. En 1983 ok aktoroj de la Tibet-teatra Trupo invitite faris turneon en Tokio kaj aliaj ĉ. 20 lokoj de Japanio kaj ricevis varman laŭdon de la spektantoj.

La moderna dramo debutis sur la Tibeta Altebenaĵo post la demokratia reformo de Tibeto en 1959. La Tibeta Moderna-drama Trupo nun nombras pli ol cent membrojn. En la pasintaj pli ol 20 jaroj ĝi kreis kaj prezentis "Princino Ŭenĉeng", "Homo Malpermesita Naskiĝi", "Larmoj de Neĝmonto", "Neĝlotusoj sur Glacimonto" kaj aliajn dekojn da bonaj teatraĵoj. En la lastaj jaroj ĝi verkis kaj prezentis grandan historian dramon "Sunzamkampo" prikantantan la antikvan nacian heroon Sunzamkampo, kaj surscenigis la mondfaman dramon "Romeo kaj Julieta".

Kun la literatura kaj arta prospero aperis nombro da eminentaj artistoj en Tibeto. Kantistino Cajdanĝuoma estas ilia elstara reprezentanto. En la komenco de la sesdekaj jaroj ŝi jam famiĝis tra Ĉinio. Ŝia prezentado estas gustplena de tibeta popolkanto. Ŝia belsona kaj sento-plena kantado estas ŝatata de la aŭskultantoj. Ŝi plurfoje vizitis aliajn landojn. Per sia kantado ŝi ĉarmis alilandanojn kaj ricevis ilian respekton kaj laŭdon. Post Cajdanĝuoma ree aperis nombro da novaj kantistoj, kiaj Daĝen, Cangĝjueĝuoma. Ĉjuĝen, Jangzong kaj Sangmu. La mezaĝa verkisto Jiŝjidanzenĝ ĝuas famon en la ĉinaj literaturaj rondoj, liaj romanoj "Postvivantoj" kaj "Ĵuro-nuliganto" estas laŭdataj kiel vera tibeta literaturo. En la lastaj jaroj verkisto Sŭolangciĝen verkis pli ol 30 dramojn, teatraĵojn kaj operojn, inter kiuj sep estis premiitaj en la tuta lando kaj aŭtonoma regiono. Artisto Tudeng, kiu iniciatis la tibetan humuran dialogon, lertas en kantado, dancado kaj humura dialogo kaj muzikil-ludo, tial li estas laŭdata kiel genia artprezentanto.




La tibeta teatro multe ŝatata de la popolo

de ĈENG ŜJI

Sceno el la teatraĵo "Princino Ŭenĉeng" prezentata de la Tibeta Teatra Trupo

de ĜAĜŬOLŬO






"Biografio de Reĝo Gesal" en lirika formo
de **CAJLONG**



Skulpturo en konstruaĵo de temploj
de **ĈENG ŜJI**



Butera skulptaĵo
de **KANG SONG**

*Vazo kaj ornamaĵoj de la
neolitiko elterigitaj en Tibeto*

Fotoj de **KANG SONG**






Artistoj de la Tibeta Teatra Trupo
de LIŬ TJĚŠENG



Lignogravuristo
de LING FENG





Huraas ĉinaj kaj eksterlandaj junuloj.

Renkontiĝo por Paco kaj Amikeco



Fotoj de ŜEN ĈEN

Amika renkontiĝo



Diverslandaj junuloj kun afiŝoj de la Internacia Jaro de Junuloj

Ĉi jaro estas la Internacia Jaro de Junuloj. En majo la Ĉina Organiza Komitato de la Internacia Jaro de Junuloj okazigis la "Amika Renkontiĝo de Junuloj en la Regiono de Azio kaj Pacifiko", en kiu partoprenis 61 delegacioj kun pli ol 300 membroj el 40 landoj


kaj internaciaj organizaĵoj. Por la mondpaco kaj la progreso de la homaro ili ĝoje kunvenis en Pekino.

Estis la unua fojo, ke Ĉinio organizis tian grandskalan internacian renkontiĝon por junuloj. Di-

verslandaj junuloj vaste diskutis pri la temo de la jaro "Partopreno, Disvolvo kaj Paco". Dum la renkontiĝo la partoprenantoj rigardis la ekspoziciojn de belarto, fotoj kaj disertaĵoj de ĉinaj junuloj, faris amuzajn aktivadojn kun ĉinaj junuloj kaj vizitis la Grandan Muron, Imperiestran Palacon kaj 14 urbojn. En atmosfero de unuiĝo kaj amikeco ili pasigis la belan duonmonaton.



Estroj de la delegacioj en Ĝongnanhaj de Pekino




Nov-Zelandaj Junulinoj en foto-ekspozicio



Jordanaj junuloj interparolas kun studentoj de la Diplomatia Instituto.

Diverslandaj junuloj legas la ĵurnalon "Renmin Ribao", en kiu aperas la informo pri la renkontiĝo.

Sur la Granda Muro



PACO, KUNLABORO KAJ DISVOLVIĜO

La 21-a jarcento per firmaj paŝoj alproksimiĝas al ni. Kia mondo atendas la homan socion tiam? Ĉu paca aŭ milita? Ĉu prospera aŭ mizera? Ĉu progresas aŭ regresa? Jen grava elekto antaŭ la homaro saĝa kaj iam ankaŭ stulteta.

NIA MONDO

Ni vivas en la mondo plena de kontraŭdiroj kaj konfliktoj. La serioza kontraŭstaro inter la Oriento kaj Okcidento kaj la ekstreme anormala rilato inter la Sudo kaj Nordo estas fundamentaj kaŭzoj de la transformiĝo kaj akriĝo de diversaj internaciaj kontraŭdiroj. Sekve de tio, naskiĝis diversaj kontraŭdiroj, kiuj metis antaŭ la internacian socion du grandajn danĝerojn: la nuklea konflikto, kiu povas pereigi la homan civilizacion, kaj la malnova ordo de la neracia internacia ekonomio, kiu malhelpas la mondan disvolviĝon.

Ni vivas en la nuklea epoko. La paca ekspluatado de nukleaj teknikoj eble donos al la homaro brilan perspektivon por utiligi la naturon, tamen la nukleaj armiloj kun ultramortiga forto eble metos la homaron en malluman abismon. Kaj cetere, se eĉ la nuklea konflikto estas nur ebla danĝero, ankaŭ la senĉesaj konstantaj konfliktoj de malsamaj skaloj kaj malsamaj kvalitoj serioze minacas la sekurecon kaj stabilecon de la internacia socio kaj dronigas la mondon en konstantan ĥaoson kaj tumulton.

Ni vivas en la mondo unuigita sed splitigita. Unuflanke, la organika mondmerkato jam anstataŭis la antaŭan aŭtarcion kaj pordfermismon lokan kaj naciecan. Ĉiuj landoj rilatas kaj helpas unu al alia en komerco, kapitaloj, teknikoj, materialoj kaj vendo. Aliflanke, inter diversaj landoj kaj regionoj ankaŭ ekzistas grandnombraj kontraŭdiroj kaj konfliktoj pro la malsamaj niveloj en la disvolviĝo de la ekonomio kaj la socio, diferencoj inter ideologio kaj koncepto pri valoro kaj inter kulturo kaj religia kredo. Tial, la rilato inter la Sudo kaj Nordo ne povas ne esti elstara pro-

blemo. Ĝia pliboniĝo kaj malboniĝo rekte influas la ekonomian kaj politikan situacion de la mondo.

Unuvorte, la rilato inter la Oriento kaj Okcidento kaj tiu inter la Sudo kaj Nordo estas la du plej elstaraj el la multaj faktoroj, kiuj influas la hodiaŭan internacian situacion, alivorte, kiam la homa socio eniros en la 21-an jarcenton, ni alfrontas la kompleksan kaj seriozan situacion. Vizaĝe al la situacio, la popoloj de ĉiuj landoj devas celi radikale mildigi la internaciajn kontraŭstarojn kaj kontraŭdirojn en politiko, militafero, ideologio kaj ekonomio por efektiviĝi eternan pacon kaj stabilan disvolviĝon. Por tio la registaroj kaj popoloj de ĉiuj landoj devas fari decidan elekton.

PACA KUNEKZISTO — LA ELEKTO DE LA EPOKO

La historio de la postmilitaj internaciaj rilatoj konstatis, ke la paca kunekzisto estas la ĝenerala principo kaj efika metodo por trakti la interrilatojn inter diversaj landoj kaj efektiviĝi pacon, kunlaboron kaj disvolviĝon.

La paca kunekzisto estas kriterio de diversaj landoj por solvi konfliktojn kaj trakti interrilatojn per civila maniero sub la premiso, ke oni ne ŝanĝu nek tuŝu la respektivajn sociajn sistemojn kaj avantaĝojn, kaj surbaze de egaleco kaj memvoleco. Ĝi estas la bazo de diversaj landoj por fari plurflankan kunlaboron kaj realigi kuman disvolviĝon kaj prosperiĝon. Ĝi ne postulas, ke oni ŝanĝu sian politikan kredon, koncepton pri valoro kaj religian kredon, sed male, ĝi permesas kaj respektas ne nur la ekzistantajn diferencojn kaj malakordojn, sed ankaŭ la elekton de ĉiuj landoj al politika kaj ekonomia sistemo kaj sociaj vivmanieroj, por sur tiu bazo realigi la kunekziston kaj komunan prosperon.

Nuntempe la principo de la paca kunekzisto praktikata en la internaciaj rilatoj ne nur havas pli aktualan signifon ol en la pasinteco, sed ankaŭ nepre tendenco de la internacia socio al egaleco

kaj progreso. Kvankam la hodiaŭa kontraŭstaro inter la Oriento kaj Okcidento ankoraŭ mastras la mondan situacion, tamen la plur-polarizo en la internacia politiko ne povas retroiri. Kvankam la rapida disvolviĝo de ekonomia vivo, sciencoj kaj teknikoj kaj inform-transsendo multe reduktis la mondon, kaj la intereso kaj malutiloj de ĉiuj landoj estas pli strikte ligitaj, tamen la naciaj sento kaj volo kaj ŝtataj suvereneco kaj intereso fariĝis pli elstaraj kaj pli akre sentebaj ol en la pasinteco. La postmilita praktiko montris, kiel ajn potencaj estas la militaj kaj ekonomiaj fortoj de lando, se ĝi intencas per armitaj fortoj eksporti revolucion aŭ kontraŭrevolucion, aŭ altrudi sian volon al aliaj landoj, ĝi ne povas ne esti forte riproĉata morale, kontraŭstarata decideme kaj ŝarĝita peze. Sekve de tio, la afero iras tute kontraŭ ĝia deziro.

Same kiel la paca kunezisto, ankaŭ la nealianciĝa politiko estas efika rimedo por preventi internacian konflikton sen konsidero de ideologiaj kaj socisistemaj diferencoj. Se okazas kontraŭdiro aŭ konflikto inter nealiancitaj landoj, ĝi estas nur duflanka, parta kaj facile solvebla.

La paca kunezisto garantias, ke la diverslandaj popoloj povos libere elekti sian socian sistemon kaj disvolviĝan vojon. Kian vojon oni devas iri, tion rajtas decidi nur la popolo mem laŭ sialandaj kondiĉoj kaj rimedoj kaj post praktiko, kaj la eksteraj faktoroj okupas nur la duan lokon. Nekonsiderante la kondiĉojn kaj interesojn de aliaj landoj devigi ilin ĉiam sekvi sin en la agado estas nenio alia ol kopio de la arkaikaj ideoj karakterizitaj per agreso kaj interveno. En la internaciaj aferoj oni devas plene forigi ilin.

KUNLABORO KAJ DISVOLVIĜO — VOJO AL KUNA PROSPERIĜO

Hodiaŭ en la unueca mondmerkato troviĝas neniu lando, kiu povas izolate stari ekster la mondo, kaj rompi aŭ apartigi la internacian produktan kaj konsuman rilatojn, se ĝi deziras rapidan disvolviĝon en ekonomio. Tamen dank' al ekzisto kaj evoluo de multaj sociaj formoj kaj disvolvaj etapoj, ekzistas grandnombro da diversaj kontraŭdiroj, malakordoj kaj konfliktoj ĉie en la mondo, kio multe malhelpas la disvolviĝon de diversaj landoj. Tio postulas, ke ĉiuj landoj ne nur praktiku pacan kuneziston sed ankaŭ amike kunlaboru kaj kune disvolviĝu surbaze de la paca kunezisto.

La rilato inter la Sudo kaj Nordo havas grandan influon sur la mondan ekonomion kaj internacian politikon. Oni povas diri, ke la fundamenta pliboniĝo de la internacia ekonomia situacio en la proksima estonteco kaj eĉ en la 21-a jarcento dependos de la radikala ŝanĝo de la rilato inter la Sudo kaj Nordo, bazita sur nejusta kaj neegala internacia ekonomia malnova ordo. La perspektivo de la rilato inter la Sudo kaj Nordo dependos de nia elekto: ĉu kontraŭstaro aŭ kunlaboro.

Kontraŭstaro kondukas al seneliro kaj sole kunlaboro estas la plej saĝa elekto. En la internacia ekonomio kaj fortoj aktualaj kaj latentaj de la disvolviĝantaj landoj estas neignorableblaj. Laŭ skiza takso, en la fino de la kuranta jarcento la industria totala produktovalorado kaj totala komerca sumo de la disvolviĝantaj landoj konsistigos 27 % kaj 28 % respektive de la tuta mondo. En la mondaj ekonomiaj strukturoj dependantaj unu de alia kaj komplektigantaj unu alian, la disvolviĝo kaj prosperiĝo de iu ajn lando intime ligiĝas kun tiu de la aliaj. Por realigi stabilan kaj sanan disvolviĝon de la monda ekonomio, la evoluantaj landoj devas ŝanĝi sian pasivan sintenon en la Sud-Norda Kontakto kaj alpreni la sintenon de kontaktanto kaj kunlaboranto, kio solvos la problemon.

La historiaj spertoj pruvis kaj pruvos, ke solvi konfliktojn inter malsamaj politikaj sistemoj kaj malsamaj ideologioj per armitaj fortoj kaj renverso estas nelaŭdinde. Same la politiko teni aliajn landojn postiĝintaj kaj sian landon avangarda estas esence daŭrigo kaj variĝo de la malnova koloniismo, kio fine malgrandigas la merkaton de la lando kaj limigas ĝian disvolviĝon; la politiko trakti najbaron kiel malamikon kaj transmovi krizon al aliaj fakte estas miopeca; kaj la politiko paradigi sian "superecon" per ekonomia blokado kaj rifuzo de interkontakto kaj apartigi la interkomunikiĝan mondmerkaton utilas al neniu.

La moderna historio jam pruvis, ĉu iu lando povas memstari inter la mondaj nacioj aŭ ne, tio ne dependas de ĝia armita minaco al la najbaroj nek de ĝia hegemonio super la mondo, sed de ĝia naci-ekonomia disvolviĝo altkvalita kaj altrapida, sincera kunlaboro kun aliaj landoj kaj akcelado de la internacia ekonomia kaj kultura interŝanĝo por ke en la lando aperu socio pli riĉa, pli egala kaj pli demokratia.

(Daŭrigo sur p. 68)

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.


- * Kontraŭ almenaŭ 50 stampitaj nedifektitaj neordinaraj poŝtmarkoj ĉinaj, japanaj, okcident-eŭropaj, usonaj, ĉeĥaj, kanadaj, aŭstraliaj, izraelaj, mi sendos samkvante kaj samkvalite la hispanajn. Santiago Martin, Fray Juan 25-6 K, Zorroza-48013 Bilbao, Hispanio.
- * 18j. studentino deziras korespondi tutmonde kun gevegetaranoj pri manĝaĵo kaj ĉiuj aliaj temoj. Erica Nilsson, Lazavagen 36, S-121 60 Johaneskov, Svedio.
- * Mi (15-jara) volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Adreso: Osvath Kinga-Eniko, Str. Ion Buteanu Nr. 7 Ao. 10,4300 Tirgu-Mures, Rumanio.
- * S-ro He Hong-xiang (teknikisto), Renmin Zhonglu 3-31, Chengdu, Sichuan-provinco, Ĉinio, dez. kor. tutmonde precipe kun pola esp-isto pri diversaj temoj.
- * 22-jara poŝtisto dez. kor. kun samfakulo kaj kolekti E-p.m. kaj b.k. Amiko, kiu sendos al mi E-poŝtmarkojn, certe ricevos respondon kaj ĉinajn poŝtmarkojn. Adreso: S-ro Li Changlu, P.O. Damalu, Changchun, Jilin-provinco, Ĉinio.
- * Maeda Jasuharu, Apartamento Mijako 2-1, Sagamigaoka 3-71-5, Zama-ŝi, Kanagawa 228, Japanio, 18-jara studento deziras korespondi kun kamparanoj el la tuta mondo.
- * S-ro Kamil Oleksial, 09-133 Wrona, Pollando, deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj.
- * 58-jara svisa instruisto deziras korespondi kun ĉinaj kaj japanaj geamikoj pri ĉiuj temoj. S-ino Lambercy, Pierre-fleur 62, 1004 Lausanne, Svislando. CH.
- * Gekursanoj de 20-40-jaraĝaj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj kaj interŝanĝi p.m. kaj b.k. Skribu al ilia instruisto Momĉilo Pavloviĉ, Naselje "14. Oktobar" B-2/10, YU-37000 Kruŝevac, Jugoslavio.
- * Venezuelaj geesperantistoj deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. David G. Valecillos V., Calle 79 no. 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuela.
- * Slawomir Majkowski, ul. Ogwdowa 27, 11-706 Rybno, Woj. Olsztyn, Pollando, deziras korespondi kun ĉinaj leteramikoj pri muziko kaj sporto.
- * 62-jara pensiulino plezure korespondus kun ĉina samideano(in)o. S-ino Ortrun Fischer, Weststr. 45, 8980 Oberstdorf, FR. Germanio.
- * Se vi havas E-gazetojn aŭ librojn kiujn vi ne bezonas, b.v. sendi ilin al AZMA biblioteko kiel donaco kaj kunlaboro. AZMA estas E-lernejo, Tehran-Gholhak-Iran. P.O. Box 19A15, 439 Vahidi.
- * Mi volas korespondi kun 17-jaraj hungaraj fraŭl(in)oj pri ĉiuj temoj. Bokosello, Str. 1mai Nr. 12. Gheorgheni, jud. Harghita, 4200 Rumanio.
- * Geklubanoj el Vladivostoka Esperanto-Klubo deziras havi korespondamikojn el Ĉinio. Adreso: av. 100 let Vladivostoku 103, SU-690039 Vladivostok, USSR.
- * 15-j. studento dez. kor. tutmonde. Amilton Jorge, r.Cmte. Costa 1943 ap. 282, 78000 Cuiaba-MT Brazilo.
- * 30-jara instruisto dez. kor. kun geamikoj t.m. pri ĉ.t. esperante, angle. S-ro Malik Abdul Masjood, P.O. Mohra Sayyedat Tehsil Murree, Distt. Rawalpindi, Pakistan.
- * 5 gelernantoj de elementa Esperanto-kurso (4 dommastrinoj kaj 1 inĝeniero) deziras korespondi kun geĉinoj pri vivo, lernado, medi-malpurigo ktp. Hino-a Esperanto-Societo, 159 Manganzi, Hino-si, Tokio, 191 Japanio.
- * 65-jara emeritulo Josef Weidacher (fervojesto), Schneefinkeweg 11, 8000 Muchen 82, FR Germanio, dez. kor. kun ĉino.
- * S-ro Mike Kreppner (36-j. loĝanta en tendo) dez. kor. tutmonde kun aliaj tendloĝuloj pri tradicia popol-muziko. Box 204 Orono Maine 04473 Usono.
- * 22-j. Piotr Rychlewski, 08-440 Pilawa, AL Wyzw. 283, Pollando, dez. kor. tutmonde pri muziko, sporto, geografio, politiko ktp.
- * 16-jara Wiesława Garbacz, Bydgoszcz 85-236, UL. Grunwaldzka 12B/46, Pollando, dez. kor. kun knab(in)o el Ĉinio. Mi kolektas p.m. kaj interesiĝas pri sporto.

ETIKETO DE ĈINOJ

de MEJ ĜI

La ĉinoj tre atentis sian etiketon kaj bone praktikas ĝin.

La etiketo de la antikva Ĉinio inkludas ne nur konkretajn ritojn, sed ankaŭ serion da sistemoj kaj rilataj ideologioj. Ĝi ne klare distingiĝas de la ŝtataj leĝoj kaj registara reĝimo. En multaj politikaj kaj juraj difinoj montriĝas ĝia enhavo. Ekzemple, en Ĝoŭ-dinastio (11-a jc. a.K. — 256 a.K.) estis kulto al dio, al la suno, luno, steloj, montoj, riveroj, arbaroj kaj lagoj; ceremonio de funebro al mortinto kaj al mal-



feliĉego kaŭzita de natura katastrofo aŭ home farita plago, milita mobilizo kaj ceremonio por ĉasado, peto de reĝa aŭdienco far princoj kaj reciproka vizito de princoj kaj ilia alianciĝo, kaj geedziĝa ceremonio kaj ceremonio por adoltiĝo de viro.

Sed la etiketo de la moderna Ĉinio estas multe pli simpla ol tiu de la antikva. Nun mi prezentu kelkajn ĝentilajn esprimojn.

Se oni renkontas sian konaton kun familia nomo Ĝang aŭ Li, oni vokas lin Laŭ Ĝang aŭ Ŝjaŭ Ĝang, Laŭ Li aŭ Ŝjaŭ Li (Ŝjaŭ portas nuancon karesan al la junaj kaj Laŭ karesan al la pli aĝaj) aŭ vokas laŭ lia persona nomo. Kiam vi petas helpon de iu, ne voku lin per "he". Oni vokas maljunulon avo aŭ maljuna kamarado kaj maljunulinon avino aŭ maljuna kamaradino. Oni salutas junulon aŭ mezaĝulon kamarado kaj infanon kamaradeto aŭ amiketo. Se oni volas informiĝi pri io, oni diras: "Mi volus demandi vin..." "Mi petas vin..." Ricevinte respondon, oni diras dankon.

Ĉe la antikvaj ĉinoj estis multaj ĝentilaj salutmanieroj. Kiam oni renkontis sian amikon aŭ konaton, oni vertikale svingis la kunmetitajn duonpugnigitajn manojn, iom klinante sian buston.



Por saluti pli aĝajn, oni devis surgenuiĝi kaj klini la kapon al la tero. Sed nun oni salutas manpreme. Kelkfoje oni salutas novan konaton per kapklino kaj post tio eldiras sian nomon. Ĉe la interkonatiĝo oni ĝenerale ne demandas pri aĝo, salajro kaj geedzeco, sed nur demandas: "Kiel vi nomiĝas?" aŭ "Kiel mi nomu vin?" "Ĉu bone fartas via familio?" En la antikva Ĉinio oni uzis diversajn karesajn kaj humilajn esprimojn, kiel "via sinjora moŝto", "via honora domo",

“viaj respektindaj gepatroj”, “granda frato”, “viaj amindaj gefiloj”, “via humila servisto (mi)”, “mia mizera domo”, “mia samejmano”. Kvankam la ĉinoj nun ne severe observas tian etiketon, tamen ili ankoraŭ tre respektas sin reciproke.

En buso gejunuloj ofte cedas sian sidlokon al gemaljunuloj, infanoj kaj gravedulinoj.

Por viziti amikon, oni anticipas petas lian konsenton pri tempo de renkontiĝo. Veninte al lia hejmo, oni devas frapi lian por-

don. Ne decas eniri antaŭ permeso.

La eŭropanoj manĝas supon senbrue per kulero kaj la japanoj uzas bastonetojn por tio kaj ŝmacas per la lipoj por montri sian plezuron pro la supo. Ankaŭ la ĉinoj manĝas per bastonetoj, sed ili ne ŝmacas, precipe kiam ili manĝas kune kun gasto. Ne licas al manĝanto kliniĝi al tablo, nek montri al iu ajn per bastonetoj.

Ĉe la adiaŭo al nova konato oni ne petas lian adreson, se li ne memvole informas. Kiam oni in-

tencas teni la interrilaton, oni unue donas al li sian adreson kaj poste demandas: “Kiamaniere mi kontaktiĝu kun vi?”

第十六课 Deksesa Leciono

介绍 *Interkonatiĝo*

Ofte uzataj vortoj

我叫鲍尔
我在巴黎工作
您忙吗
您今年多大岁数
我今年四十岁
这位小姐是……
这位是玛丽小姐

wǒ jiào Bàoěr
wǒ zài Bālí gōngzuò
nín máng ma
nín jīnnián duōdà suìshù
wǒ jīnnián sìshí suì
zhèwèi xiǎojiě shì……
zhèwèi shì Mǎlì xiǎojiě

mi nomiĝas Paŭlo
mi laboras en Parizo
ĉu vi estas okupita
kiom da jaroj vi havas ĉi-jare
ĉi-jare mi havas 40 jarojn
tiu ĉi fraŭlino estas...
tiu ĉi fraŭlino estas Maria

Dialogo

A: 您好。我叫鲍尔。

A: Nín hǎo. Wǒ jiào Bàoěr.
vi bon- mi nomiĝ- Paŭlo

A: Saluton. Mi nomiĝas Paŭlo.

B: 欢迎您，鲍尔先生。

B: Huānyíng nín, Bàoěr xiānsheng.
bonven- vi Paŭlo sinjor-

B: Vi estas bonvena, sinjoro Paŭlo.

A: 我在巴黎工作。

A: Wǒ zài Bālí gōngzuò.
mi en Parizo labor-

A: Mi laboras en Parizo.

B: 您忙吗?

B: Nín máng ma?
vi okupit- ĉu

B: Ĉu vi estas okupita?
 A: 我 很 忙。
 A: Wǒ hěn máng.
 mi tre okupit-
 A: Mi estas tre okupita.
 B: 您 今年 多大 岁数?
 B: Nín jīnnián duōdà suìshu?
 vi ĉi-jar- kiom da jar-
 B: Kiom da jaroj vi havas ĉi-jare?
 A: 我 今年 四十 岁。
 A: Wǒ jīnnián sìshí suì.
 mi ĉi-jar- 40 jar-
 A: Ĉi-jare mi havas 40 jarojn.
 B: 您 身体 好 吗?
 B: Nín shēntǐ hǎo ma?
 vi fart- bon- ĉu
 B: Ĉu vi bone fartas?
 A: 很 好, 谢谢。
 A: Hěn hǎo, xièxie.
 tre bon- dank-
 A: Tre bone, dankon!

Klarigo:

En la frazo “我在巴黎工作” (mi laboras en Parizo), “在” estas prepozicio montranta

B: 这 位 小 姐 是 ……
 B: Zhèwèi xiǎojie shì ……
 tiu ĉi fraŭlin- est-
 B: Tiu ĉi fraŭlino estas …
 A: 这 位 是 玛 丽 小 姐。
 A: Zhèwèi shì Mǎlì xiǎojie.
 tiu ĉi est- Maria fraŭlin-
 A: Tiu ĉi estas fraŭlino Maria.
 B: 您 好, 玛 丽 小 姐。
 B: Nín hǎo, Mǎlì xiǎojie.
 salut- Maria fraŭlin-
 B: Saluton, fraŭlino Maria.
 A: 您 好, 认 识 您 很 高 兴。
 A: Nín hǎo, rènshi nín hěn gāoxìng.
 salut- kon- vi tre ĝoj-
 A: Saluton, estas granda ĝojo konatiĝi kun vi.
 B: 我 也 很 高 兴。
 B: Wǒ yě hěn gāoxìng
 mi ankaŭ tre ĝoj-
 B: Ankaŭ mi tre ĝojas.

lokon, kaj la prepozitivo “在巴黎” ĉiam antaŭas al la verbo “工作”.

(Daŭrigo de P. 64)

LA PERSPEKTIVO DE LA MONDO

La serioza rilato inter la Oriento kaj Okcidento, karakterizita per milita kliko, kaj tiu inter la Sudo kaj Nordo, karakterizita per la malnova ordo de la neracia internacia ekonomio, rapide transformas kaj akriĝas aliajn internaciajn kontraŭdirojn, el kio aperas la aktuala kaj longtempa danĝera tendenco.


Aliflanke, malgraŭ ke la internacia socio tra iris multajn zigzagojn, obstaklojn, malfacilojn kaj eĉ provizoran regreson, ĝi ankoraŭ marŝas antaŭen al la socio pli justa, pli demokratia, pli egaleca kaj pli progresata. Tio estas fundamenta tendenco neŝanĝebla per iu ajn forto de la mondo.

La progreso de la internacia politika kaj ekonomia rilatoj estas bazita sur la sendependeco kaj suvereneco de ĉiu lando kaj markita per demokratio, egaleco kaj varieco en la internacia vivo.

Ĉiu lando ne nur povas sed ankaŭ devas fari sian apartan kontribuon al la progreso. Ĉinio estas konata kiel antikva lando civilizacia. Ĝi faris utilajn kaj pozitivajn kontribuojn al la homa progreso kaj kultura disvastiĝo per siaj apartaj manieroj. Ĉiaokaze la socialisma Ĉinio ne povas ne meti brikojn kaj tegolojn sur la domo de la homa civilizacio kaj heredi ĉion belan, eminentajn kulturon, ideologion kaj tradicion.

En la pasintaj jaroj de la 20-a jarcento, la popoloj de ĉiuj landoj jam faris grandegan penadon kaj pagis pezan koston por efektiviĝi la pacon, noblan celon de la homa socio. La progresata afero de la homaro ĉiam antaŭeniras. Antaŭvideblas, ke en la 21-a jarcento la homa socio faros pezajn paŝojn pro novaj problemoj kaj malfaciloj, tamen irado de la paco kaj demokratio certe ne haltos.

* La aŭtoro estas konsilanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj.



Darakeh-Montaro ĉirkaŭ Norda
Tehrano en Frumateno

de F-ino **Otađ** (Irano)

**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**



215 AN - 1